

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

9

1982



En la vilaĝo de dungoj

Fotoj de WANG SHOULIANG kaj CAI HAIFENG



En festotago

Dungaj boatoj





En foiro



Ĉe pramejo



Tamburturo

Bela originala ponto



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Mitula Danco el la baleto "Perla Lago"

Foto de LAO BAI

SUR LA DORSKOVRILO:

En Ananasa Kultivejo (Ĉinstila pentraĵo)

de SHEN ROUJIAN

KOLORAJ SERIOJ:

En la vilaĝo de dungoj

Guifeng-monto

Fotoj faritaj de E-istoj

Lotus-blanka krabaĵo

Baleto "Perla Lago"

Vojaĝo tra la meza baseno de la Flava Rivero (6): Nova fizionomio ambaŭborde de la Flava Rivero

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Ĉinio gajnis la volanan ĉampionecon en Thomas-Pokala Konkurso.

Ulrich Lins en Ĉinio

Interesaj ludiloj


Enhavo

Popularigo de sciencoj en Ĉinio	2
MIA VIVO: Dissemado de sciencoj — mia aspiro dum la tuta vivo	6
Pri la produktado kaj aplikado de izotopoj en Ĉinio	8
Vojaĝo tra la meza baseno de la Flava Rivero (6): Ŝanĝiĝo en la malnova fluejo de la Flava Rivero	10
NIA KULTIVEJO:	
Vortfaradoj de Esperanto kaj la ĉina lingvo	17
Ĉu SUK ĉesos aŭ sukcesos?	19
ESP-NOVAĴOJ	20
Marinko Gjivoje ĉiam vivos en nia koro!	22
VIDINDAJ LOKOJ: Vizito al la monto Guifeng	26
La Ĉina Volana Teamo gajnis Thomas-Pokalon	15
Esperantisto kaj pentristo Shen Roujian	27
Mirakla kuracado	29
Nerompebla vejĉi-ludo	31
La kakemono (Novelo)	34
Du uĝuraj fabloj	39
Bona franjo, kie vi estas?	37
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Qin-regno unuigis Ĉinion	40
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: En vilaĝo de dungoj	44
Detruigo de arbaro — alia minaco al la homara ekzisto	46
AMIKECO	25
TRA LA MONDO	50
KURANTAJ AFEROJ	36
INTER NI	49
KORESPONDI DEZIRAS	52

JARABONTARIFO	Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugalia	Esc	400		
Aŭstralio	SA	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZ\$	6.70	Usono	US\$	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$	7.20

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00



Ce galerio por popularigi sciencojn

LI MING:

Popularigo de Sciencoj en Ĉinio

FONDAĴOJ POR POPULARIGI SCIENCOJN

La malalta scienca kaj teknika nivelo de ĉinoj estas unu el la malfaciloj de Ĉinio en ĝia moderniga konstruado. La statistiko de 1980 montris, ke 80% de la laboristoj kaj oficistoj de Ĉinio ne atingis la klercon de elementa mezlernejo. Teknikistoj konsistigis nur 2.8% de la totala nombro de laboristoj kaj oficistoj en industriaj fakoj. Ankoraŭ ne efektiviĝis popularigo de elementa eduko al okcent miliono da kamparanoj. Ĝuste pro tio la ĉina registaro sufiĉe atentis tiun laboron.

En Ĉinio, krom iuj ŝtataj institucioj kaj popolaj organizaĵoj, la Ĉina Scienca-Teknika Asocio estas la ĉefa organizaĵo por popularigi sciencojn. La 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj pli ol 1 800 gubernioj ĉiu havas sian propran asocion. Ankaŭ iuj fabrikoj kaj popolaj komunumoj starigis tian fondaĵon.

La Ĉina Scienca-Teknika Asocio konsistanta el 105 institutoj kaj studrondoj havas kiel siajn membrojn multajn famajn sciencistojn, profesorojn, edukistojn, sciencpopularigajn verkistojn kaj inĝenierojn. Ili ofte verkis artikolojn aŭ faris prelegojn por prezenti novajn fruktojn en scienca esplorado en kaj ekster la lando kaj por popularigi sciencajn sciojn.

La ĉina registaro disponigis al tiu laboro monrimedon, ejojn kaj ekipaĵojn. En la ĉina ĉefurbo kaj aliaj urboj estas industriaj kaj agrokulturaj ekspoziciejoj, muzeoj de naturscienco, observatorioj, muzeoj de geologio, akvarioj kaj domoj por higiena eduko. Ĉar la ĉina ekonomio estas ankoraŭ subevoluinta, la ejoj por la sciencpopulariga aktivado estas ĝenerale malgrandaj kaj la ekipaĵoj malmultaj.

DIVERSAJ FORMOJ POR POPULARIGI SCIENCOJN

En la pasintaj jaroj la diversformaj aktivadoj por popularigi

sciencojn altiris al si vastajn amasojn kaj rikoltis bonan rezulton.

De 1980 la Ĉina Scienca-Teknika Asocio kaj lokaj studrondoj funkciigis multajn kursojn pri sciencaj scioj, kiujn vizitis ordinaj laboristoj, kamparanoj kaj ŝtataj kaj partiaj gvidantoj. Ekzemple en la pasintaj du jaroj famaj sciencistoj donis kvin lecionojn al membroj de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj gvidantoj de la Ŝtata Konsilantaro. Iuj registaraj departementoj, fabrikoj, minejoj, entreprenoj, popolaj komunumoj ofte okazigas diversajn fakajn kursojn.

Nun la popolamasoj montras senprecedencan intereson por sciencoj kaj tekniko, kaj oni ofte povas vidi, ke sciencaj libroj estas konkure aĉetataj en librejoj. Laŭ statistiko, de 1978

ĝis 1980 eldoniĝis en Ĉinio ĉ. 4 300 specoj da sciencaj libroj kaj cent specoj da sciencaj periodaĵoj kun distribua kvanto de dek sep milionoj da ekzempleroj, inter kiuj estas ankaŭ gazetoj en la uĝura, mongola, korea, tibeta kaj aliaj nacimalplimultaj lingvoj.

La ĵurnalo "Renmin Ribao" (Popola Ĵurnalo) kun distribua kvanto de kvin milionoj da ekzempleroj kaj aliaj 29 provincaj ĵurnaloj malfermis rubrikon pri scienc-popularigo, kaj ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj eldonas scienc-teknikajn gazetojn kaj ĵurnalojn kun totala distribua kvanto de 3.5 milionoj da ekzempleroj. Disaŭdigaj kaj televidaj stacioj sendas programerojn pri higieno kaj aliaj sciencaj scioj du-trifoje semajne. La tri Sciencedukaj Filmstudioj de Ĉinio ĉiujare povas fari ĉirkaŭ tricent filmojn, inter kiuj "Flava Mustelo" estis premiita kiel bona scienceduka filmo en 1980. En la pasinteco la flava mustelo estis rigardata kiel malutila besto pro ĝia damaĝo al dombirdoj. La filmo per faktoj montras, ke ĝi sin vivtenas ĉefe per kapto de ratoj kaj aliaj malutilaj bestoj. Pro tio ĝi devas aparteni al la utilaj bestoj, kaj krome ĝia felo estas tre valora.

Ekspozicioj pri sciencoj kaj teknikoj fariĝas ĉiam pli multaj en Ĉinio. Inter tiuj la "Ekspozicio pri la Protektado de la Ĉina Natura Medio", la "Tutlanda Ekspozicio pri Sciencaj kaj Teknikaj Verkoj de Geknaboj" kaj la "Ekspozicio pri Seksa Scio" el Francio estis tre bonvenaj al la ĉina publiko.

Proksime al la movoplena komerca strato Xidan, la Pekina Scienca-Teknika Asocio aranĝis



Agronomo Ding Zhenya kaj la de li elkulturita bonspecio de tritiko

galerion por popularigi sciencojn, kie pli ol dek fakaj institutoj malfermis montrofenestrojn kun riĉaj enhavoj, de fermentintaj mangaĵoj ĝis observado al planedoj. Ĉar multaj magazenoj en tiu strato aranĝas siajn montrofenestrojn por prezenti sciencajn sciojn rilate al siaj varoj, ĝi estas nomata la "Sciencpopulariga Strato". Tiaj montrofenestroj vidiĝas ĉie en la ĉefaj komercaj kvartaloj de Pekino. Ĉi tiun formon de sciencpopularigo nun imitas Tianjin, Shenyang, Harbin kaj aliaj grandaj urboj en Ĉinio.

EN LA MEZGRANDA URBO CHANGZHOU

La popularigo de sciencoj multe akcelis la produktadon kaj en

tio Changzhou estas bona ekzemplo.

Changzhou kun 380 000 loĝantoj troviĝas en Jiangsu-provinco en la orienta parto de Ĉinio. En la pasintaj jaroj ĝia industria produktado rapide progresis dank' al la popularigo de sciencoj. En 1981 ĝia totala industria produktovaloro atingis 4 140 milionojn da juanoj, t.e. kvindekoble plimultiĝis ol antaŭ la Liberiĝo. El tio la produktovaloro de malpeza industrio konsistigis pli ol 50% de la totala produktovaloro. Ĝia bonkvalita kordurojo debitas en merkatoj en- kaj ekster-landaj. En la pasinta jaro oni kreis 202 novajn specojn de produktaĵoj, inter kiuj 160 estas de malpeza industrio.

La plimulto de la tekstilaj ekipaĵoj de la urbo estas fabrikita antaŭ la Liberiĝo. Pro sia kadukeco ili havis malaltan produktivecon. En la pasintaj multaj jaroj laboristoj kaj teknikistoj persistis en teknika renovigo kaj faris ĉiujn spindelojn altrapidaj. Iuj malnovaj kaj malbone funkciantaj teksmaŝinoj estas ne plu uzataj.

Dank' al disvastigo de novaj teknikoj progresis la galvaniza kaj elektronika industrio. Oni ne nur malaltigis la koston de galvanizado kaj altigis la kvaliton, sed ankaŭ reduktis la polucion de ĝia venena gaso.

La 28 fakaj institucioj sub la Changzhou-a Scienca-Teknika Asocio estas la ĉefaj fortoj de la sciencopopulariga aktivado de

la urbo. Ekzemple, la membroj de la galvaniza institucio estas ĉefaj teknikaj fortoj de fabrikoj, kiuj aktivadas unufoje monate por interŝanĝi kaj disvastigi teknikojn. Tiel ili kontribuas al la galvaniza produktado de la urbo.

La sciencopopularigo de Changzhou ne nur strikte sin kombinas kun la produktado, sed ankaŭ profundiĝas en diversajn flankojn de la socio. En la pasintaj tri jaroj oni okazigis 1168 kursojn por doni sciojn pri elektroniko, energiŝparado, medicino, higieno, kulturado de floroj kaj tiel plu. Kiam oni donis sciojn pri kulturado de ĉina rozo, oni ankaŭ konigis al la aŭskultantoj sciojn pri verdigo de urboj kaj hejmoj kaj ties gravecon.

SCIENCOJ ESTU UZATAJ EN LA VASTA KAMPARO

La novaj ekonomiaj politikoj aplikitaj en la ĉina kamparo en la pasintaj proksimaj jaroj efike mobilizis la aktivadon de la kamparanoj, kiuj montris ĉiam pli fortan deziron lerni sciencojn kaj teknikojn. Pro tio pli ol 3 800 popolaj komunumoj de la tuta Ĉinio fondis sciencopopularigajn asociojn, kiuj efike helpas la kamparanojn en la scienca terkulturado laŭ ilia reala stato.

La komunumo Zhangmu de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono havas 50 000 loĝantojn kaj pli ol 3 000 hektarojn da kampoj. La kamparanoj ĝenerale havas klarecon de elementa lernejo. Post la Liberiĝo iom boniĝis la po-

Partoprenantoj de la Pekina Geologia Somera Kampejo por Mezlernejoj rigardas rokan specimennon.



pola vivo kaj fondiĝis nombro da elementaj kaj mezgradaj lernejoj. Tamen nur malmultaj homoj sukcesis fini la lernadon en la mezlernejo. La malalta klereco limigis la tiean produktadon.

En 1979 la komunumo starigis sciencopopularigan asocion kun 233 membroj inkluzive de terkulturaj teknikistoj, veterinaroj, kuracistoj, produktaj lertuloj kaj metiistoj.

En la pasinteco, kiam oni bredis porkojn laŭ la tradicia maniero, la porko povis atingi iom pli ol cent kilogramojn post 12 ĝis 15 monatoj. En 1978 la komunumo sendis al alia provinco teknikistojn lerni novan metodon de porkobredado, per tiu metodo ses-monata bredo povas kreskigi porkon ĝis la pezo de cent kilogramoj. Teknikistoj faris bildojn facile kompreneblajn por prezenti tiun avangardan metodon. Ili pendigis la bildojn en la komunuma foirejo dum 18 foiraj tagoj kaj elmontris kelkajn grasajn porkojn breditajn per tiu metodo, kaj la porkobredistoj servis kiel la klarigantoj. Aŭskultinte la klarigojn, kamparanoj konkure aĉetis materialojn pri la nova metodo. Per tiu metodo iu kamparano sukcesis grasigi sian porkon ĝis la pezo de 155 kilogramoj post ses monatoj.

La sciencopopulariga asocio de la komunumo faris multajn laborojn ankaŭ en plibonigo de grundo, preventado de fiinsektaj plagoj k. s. En la pasinta jaro la frua rizo de la komunumo suferis de folia kaj tiga velkiĝo. La asocio tuj kunvokis teknikistojn de produktaj brigadoj por doni al ili sciojn pri la estiĝo, disvolviĝo, rimarko kaj preventado de la plantmalsano, kaj kondukis ilin al kampoj por observi, por ke ili tuj povu ko-



Agro-teknikistoj kaj kamparanoj de la popola komunumo Sijiqing en Pekino kune ekzamenas kvaliton de ĉina brasiko.

menci la laboron. Ellerninte la sciojn kontraŭ la malsano en la kurso, 17-jara Yan Jiayong ĝustatempe drenis akvon el la kampoj por redukti la humidecon kaj ŝprucigis insekticidon. Dank' al tio la produktokvanto de frua rizo de la brigado plimultiĝis je 4.7% kompare kun tiu de la antaŭa jaro.

Bredado de dombirdoj kaj brutoj kaj kulturado de ekonomiaj plantoj estas rekomendinda rimedo por plimultiigi la enspezon de kamparanoj. Sed en la pasinteco, pro manko de scienca metodo la kamparanoj malmulte profitis el tio. Poste la sciencopopulariga asocio de la komunumo funkciigis pli ol 150 kursojn pri medicino, bredado de porkoj,

kokoj kaj aliaj brutoj, kulturo de forsto, ĉinaj drogoj, tabako, fungoj, juto kaj oranĝoj. Ilin vizitis ses mil homoj, kiuj ludas gravan rolon en la produktado.

Yue Sifei, respondeculo de la Urba Sciencopopulariga Asocio de Changzhou diris: "Sciencopopularigo estas kvazaŭ ponto, kiu transigas sciencojn kaj teknikojn en produktajn fortojn." Ja tiel okazas en la efektiveco. Por ke la vastaj popolamasoj posedu sciencajn sciojn oni ankoraŭ devas fari multan klopodon. Nun tiu laboro estas ĵus komencita, precipe en iuj malproksimaj limregionoj, kie tre malalta estas la produktiveco, tiel ke la kamparanoj tre urĝe bezonas helpon de sciencoj.



Dissemado de sciencoj— mia aspiro dum la tuta vivo

de GAO SHIQI

La aŭtoro estas bakteriologo, kiu paraliziĝis jam antaŭ pli ol 50 jaroj. Li neniam malstreĉis sian esploron pri scienco kaj, helpate de aliuloj, persiste verkas artikolojn pri populara scienco. Per tio li fariĝis fama verkisto en tiu tereno kaj ĝuas grandan reputacion en nia lando, tiel ke geknaboj respektu nomas lin avo Gao.

— La Red. —

Mi ne obeas la sorton. En la pasintaj pli ol 50 jaroj mi ĉiam kontraŭstaris kaj provokis la Sorton. Mi jam estas 78-jara, sed sane vivis nur 23 jarojn.

La sekvajn pli ol 50 jarojn mi travivis paralizite. Sed mi ne malŝparis mian tempon. Mi batalis per plumo kaj dissemis sciencajn sciojn en la popolo. Mi nun estas profesia verkisto de populara scienco kaj krome konsilanto de la Ĉina Verkista Asocio, komitatano de la Federacio de la Ĉinaj Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj, honora prezidanto de la Ĉina Asocio de Verkistoj de Populara Scienco kaj konsilanto de la Ĉina Scienc-teknika Asocio. Mi esperas, ke mi verkos pli multe da artikoloj por popularigi la sciencojn kaj portos al la mondo pli multe da scioj kaj civilizacio, kion mi aspiras dum la tuta vivo.

Mi naskiĝis en klerula familio de Fujian-provinco de la sudorienta marborda regiono de Ĉinio. Miaj avo kaj patro ŝatis verki poemojn. Mia patrino

estis afabla kaj bonkora. Ŝi bele skribis la ĉinajn ideografiaĵojn. Influate de la familio, mi ekamis legi jam en la infaneco. Kiam mi estis 13-jara, mi sukcese eniris la faman ĉinan lernejon Qinghua (t. e. la nuna Qinghua-universitato). Tie mi lernis sep jarojn. Post la diplomitiĝo oni rekomendis min al la Viskonsina Universitato, Usono, por studi kemion. Poste mi rezignis la kemian fakon kaj eniris en la Medicinan Esploran Instituton de la Ĉikaga Universitato por tie studi bakteriologion. Ĉar mi tiam opiniis, ke la kapablo de ĉinoj por preventi kaj rezisti malsanojn estas tro malforta. Miaj pli aĝa fratino kaj pli juna frato mortis pro malsano. Pro tio mi profunde konis la malutilon de bakterioj kaj esperis, ke mi povos trovi rimedon per esploro por venki bakteriojn kaj savi miajn samlandanojn.

Tamen okazis malfeliĉaĵo. Iun tagon de 1928, laborante en la laboratorio, mi estis neatendite infektita de viruso de encefalito

A-tipa H, sed tion mi tiam ne rimarkis. Post inkubacio de du semajnoj la viruso ekatakis min. Miaj okulgloboj turnadis supren, ankaŭ la oreloj aŭdis malklare, la membroj anesteziĝis kaj la kolo fariĝis rigida. Nur tiam mi konsciis la malsanon grava.

La sorto estis por mi tiel kruela kaj senkompata, ke mia malsano iom post iom graviĝis kaj mia parolo fariĝis malklara. Mi klare konsciis, ke kompleta paraliziĝo atendas min. Sed mi persiste studis ĉiujn lecionojn por fariĝi medicina doktoro de la Medicina Esplora Instituto kaj revenis al Ĉinio en 1930.

La tiama Ĉinio estis senesperiga. Kvankam mi estis unu el la tiamaj tre malmultaj bakteriologoj en la tuta lando, tamen mi eĉ ne povis akiri por mi profesion pro mia grava malsano. Poste, mi estis dungita kiel estro de la eksperimenta sekcio de la Centra Hospitalo de Nankino. Post kelkaj monatoj mi forlasis tiun laborpostenon pro malkontento al ĝi.


Poste mi konatiĝis kun la fama ĉina edukisto Tao Xingzhi. Mi kune kun s-ro Tao fondis la porinfanan Scienc-korespondan Lernejon kaj tiel mi komencis mian verkistan vivon.

Iufoje mi hazarde foliumis gazeton kaj rimarkis novan rubrikon "Scienc Eseo". Tian vorton mi vidis unuafoje. Ĝi estis efika rimedo por prezenti sciencan enhavon per literatura formo. Ĝi estis ponto inter la popolo kaj scienco. Scienc eseo klarigas ian sciencan scion kaj per tio oni iom post iom konigas al la popolo sciencon. Kiel signifohava laboro estas la verkado de sciencaj eseoj! Kaj tiam mi komencis verki artikolojn pri populara scienco.

Mia unua scienc eseo gajnis multajn legantojn. Ĝi estis "La Vivo de la Bakterioj" publikigita en 1934. Por la sukceso mi unue devis danki s-ron Tao Xingzhi pro liaj helpo kaj konsilo. Li diris al mi: "Verki popular-sciencan artikolon signifas verki per buŝa lingvo." Lia rimarkigo helpis min multe. Mi klopodis fari miajn artikolojn facile kompreneblaj, kio poste fariĝis mia stilo en verkado. Miaj aliaj du intimaj amikoj donis al mi grandajn kuraĝigon kaj subtenon, ili poluris miajn artikolojn kaj rekomendis ilin por publikigo. De 1936 ĝis 1941 oni eldonis miajn kvin kolektojn de sciencaj eseoj. Krome, mi verkis multajn artikolojn pri populara scienco laŭ petoj de iuj gazetoj.

En 1937 mi iris al la revolucia bazloko Yan'an. Tie mi instruis en la Lernejo de Shaanbei. En 1939 mi forlasis Yan'an pro pli kaj pli graviĝinta malsano.

Kiam la nova Ĉinio naskiĝis en 1949, la popola registaro multe zorgis pri mi kaj donis al mi konvenan laboron. La koncerna



La verkinto

institucio konstruigis por mi helflavan duetaĝan domon, por ke mi povu vivi kaj verki komforte kaj akcepti gastojn. La antaŭa ŝtata vicprezidanto Dong Biwu kaj lia edzino tre zorgis pri mia edziĝo. Ili konatiĝis al mi iun laborantinon de fabrika tenejo. Ni geedziĝis en 1961.

Mia sano fariĝis ĉiam pli malbona. Mi eĉ ne povis skribi — miaj fingroj rigidiĝis. En la pasintaj pli ol 30 jaroj mi diktis miajn artikolojn, kiujn mia sekretario registris. Post kiam mi sidas longe, la sekretario helpas min stariĝi por iom ripozi, kaj post tio mi daŭrigas la verkadon. De 1949 ĝis 1965 mi verkis sciencajn eseojn kaj disertatojn kun pli ol 600 000 ĉinaj ideografiaĵoj kaj eldonis dekelkajn librojn, poemojn de naŭmil versoj, inkluzive de "La Origino de la Vivo", "La Batalo kontraŭ Epidemioj" kaj "La Bakteria Mondo".

Ankaŭ poemoj pri scienco estas grava enhavo en mia verkado. Influate de miaj familianoj, mi ŝatas poemojn. Mi ver-

kas poemojn pri scienco por la infanoj. Scienco en la okuloj de ordinaraj homoj estas teda kaj malfacile komprenebla. Post kiam ĝi portas poemajn vestojn, ĝi fariĝas viva kaj poezia. Tiajn legajojn multe ŝatas geknaboj. "Tero — Nia Panjo" verkita de mi estas tia legajo. Ĝi gajnis la unuagradan premion de la tutlandaj porinfanaj verkoj en 1954. Miaj poemoj pri scienco intimigis min al la infanoj. Ili estas miaj entuziasmaj legantoj kaj ankaŭ miaj amikoj. En mia gastoĉambro ofte aŭdeblas ridoj kaj paroloj de infanoj. Ili rigardas min kiel sian plej karan amikon kaj donacas al mi ruĝan kravaton. La infanoj el diversaj lokoj ofte skribas al mi leterojn, en kiuj ili diras al mi siajn progreson kaj inspiron ricevitan el miaj verkoj. Tio sentigis al mi senkomparan ĝojon.

Ankaŭ mia lango fariĝis ĉiam pli rigida kaj mia buŝo ne bone funkcias. Mi nun havas nur klaran penson. De la pasintaj jaroj mia edzino ĉiutage nutras min per fluida manĝaĵo kuleron post kulero, kio ĉiufoje

Pri la produktado kaj aplikado de izotopoj en Ĉinio

APLIKADO de izotopoj kaj radioj estas konsistiga parto de la paca utiligo de atomenergio. La tekniko pri izotopoj kaj radioj estas unu el la teknikaj fakoj de atomenergio, kiu havas plej intiman rilaton kun la nacia ekonomio. Ĝi postulas

malmultan investon kaj konsumas malmulte da energio, sed efikas rapide kaj multe.

De la fino de la kvindekaj jaroj Ĉinio komencis la esplorado, provfaradon kaj produktadon de radioaktivaj izotopoj. Komence ili estis uzataj en me-

dicino kaj agrokulturo kaj poste ankaŭ en petrolo, karbo, geologio, metalurgio, la kemia industrio, mekaniko, instrumentoj, termoenergio, hidroenergio, fiziko, kemio, biologio, geografio, arkeologio, mediprotektado k.a. Laŭ nekompleta statistiko, pli ol dek mil sciencistoj kaj teknikistoj okupiĝas pri la esplorado de izotopa tekniko. Nun Ĉinio jam starigis sian bazon kun certa skalo por esplori kaj produkti radioaktivajn izotopojn. Nun Ĉinio povas produkti pli ol 600 specojn de izotopoj kun totala jara produktokvanto de pli ol 50 000 pecoj, kaj formiĝis kompleta sistemo por preparado de celiloj, disigo, purigo, analizo, kalibrado, pakado kaj transportado de izotopoj.

De la sepdekaj jaroj Ĉinio aktive faris esploradojn pri novaj specoj de izotopoj, novaj teknologioj kaj metodoj por ilia fabrikado. De 1972 la Atomenergia Instituto sukcese provfabrikis produktilojn de molibdeno, teknecio, stano kaj indio, radioizo-



Traktado de plantaĵoj per gamaj radioj de kobalto-60

bezonas pli ol unu horon. Mi ne povas paroli kaj eligas nur tian sonon "N . . . O . ." Neniu scias, kion mi volas diri. Mia laboro ĉesis, ĉar mi ne povis verki per diktado. Por daŭrigi la verkadon mi komencis ekzerci min en skribado ekde 1981. Mia sekretario metis plumon inter miajn rigidajn fingrojn kaj poste

metis mian manon sur speciale faritan tablon. Per la tremanta mano mi ofte ne povis skribi kaj la plumo ofte falis el miaj fingroj. Tial mia sekretario devis foje-refoje remeti la plumon inter miajn fingrojn. Post longa peniga ekzercado mi fine povis mem skribi ekde la somero de 1981. Nun mi ĉiutage povas

skribi ĉirkaŭ mil ĉinajn ideografiajn. De tiam ĝis nun mi jam verkis pli ol cent artikolojn pri populara scienco. Krome, mi daŭrigas mian verkadon pri miaj rememoroj, akceptas vizitantojn kaj partoprenas socian aktivadon iatempe. Se nur mia mano ankoraŭ povos skribi, mi daŭrigos mian verkadon.

topan baterion, faris esploradon kaj provfabrikadon de aminacida hormono kaj nukleotida hormono etiketitaj kun tritio kaj insekticido. La instituto konstruis laborejon kun ok produktaj linioj por produkti medicinajn radioizotopojn.

En la pasintaj proksimaj jaroj la izotopa produktado de Ĉinio havis novan progreson. La specoj de produktitaj izotopoj en 1980 pliiĝis je 27.5% kompare kun tiuj en 1979, kaj ilia tiujara produktovaloro pliiĝis je 15.2%. En 1981 ili havis novan progreson. Inter ili la izotopa produktokvanto por medicino pliiĝis rapide. Ekzemple, la produktokvanto de jodo-131 en 1965 estis 0.065 kurio, sed tiu en 1981 atingis 340.5 kuriojn. La altfluksa reaktoro finkonstruita en la sudo-occidenta regiono de Ĉinio en 1980 kreis novajn kondiĉojn por produkti kobalton-60 kaj karbonon-14 de alta specifa aktiveco uzatajn en medicino kaj aliajn radioizotopojn de alta specifa aktiveco, kiujn ĝis nun importis Ĉinio.

En la pasintaj proksimaj jaroj nur tri instrumentaj fabrikoj sub

la koncerna ministerio ĉiujare liveris al medicinaj, industriaj, agrokulturaj kaj mediprotektaj fakoj pli ol 7 000 nukleajn instrumentojn de pli ol cent specoj, ĉ. 8 000 radiodetektilojn, inkluzive gaman kameron, renograman aparaton kaj lastatempe provfaritan nuklean stetoskopon kun komputilo.

Ĉinio multe progresas ankaŭ en radioimuna analizado. Nun ĝi aplikis tiun teknikon al 56 eroj de detektado, kaj ĉiujare ĉ. 750 000 homoj ricevas tian detektadon. La radioimuna analizo per A-fetoproteino estas vaste uzata en ĝenerala diagnozado kaj fruperioda prognozo de hepata kancero kaj ludas gravan rolon en kuracado kaj vivlongigo de la suferantoj. La determino farata per diversaj seksaj hormonoj kaj gonadotropismaj hormonoj estas nemalhavebla rimedo por naskolimigo kaj esplorado pri kontraŭgravedigiloj. La radioimuna analizo de diversaj hormonoj sekreciitaj de la hipotalamo, hipofizo, tiroido, pankreato kaj aliaj ne nur akcelis la disvolviĝon de la endokrinologio, sed ankaŭ estis uzata

en la teoria esplorado pri la ĉina medicino, kaj ĝojinda sukceso estis akirita en tio. Unuapaŝa statistiko montris, ke ĉ. 700 ĉinaj hospitaloj aplikas la izotopan teknikon.

Ankaŭ la aplikado de izotopoj en la industrio kaj agrokulturo estas sukcesa. Dekoj da specoj de radioizotopaj dissendometroj estis sukcese provfaritaj kaj inter ili iuj estas pogrande produktataj, ekzemple, gama densometro, dikometro, nivelometro k.a., kiuj jam estas uzataj en la industrio. Nun oni provfaras gaman akvosercilon, humidometron kaj aliajn por agrikulturo, radie selektis kaj kulturis pli ol 150 novajn speciojn de plantoj, inkluzive grenajn, oleonajn kaj fibrajn plantojn, fruktoarbojn kaj morusarbojn. En 1981 sep milionoj da hektaroj da kampoj estis kulturataj per la novaj specioj kaj la produktokvanto de greno pliiĝis je 2.5 milionoj da tunoj. La Heilongjiang-provinca Agrokultura Akademio komencis eksperimenton por plibonigi semojn per radiado, elkulturis 18 bonajn speciojn, inkluzive de tritiko,

Esplorado al la internaj organoj de la malsanulino per kolora duobla detektilo



Kampa elementa analizado per portebla disradia izotopa X-radia fluoreska analizo



Ŝanĝigo en la malnova fluejo de la Flava Rivero

de ZHENG ZHENJIE

MI vizitis la gubernion Lankao, Henan-provinco, la lastan etapon de mia vojaĝo.

En iu malfruaŭtuna mateno mi ekveturis orienten de Kaifeng per trajno kaj post malpli ol unu horo atingis la gubernian urbon, kie troviĝas la ŝtata hortikulturejo Yifeng, kiun mi intencis unue pririgardi.

Mia aŭto rapide kuris sur asfaltita ŝoseo. Mi supozis, ke mi baldaŭ vidus vastan etendaĵon de sablejoj kaj sal-alkalaj kampoj. Estis la unua fojo por mi veni tien, tamen jam antaŭlonge mi informiĝis pri tiu loko.

Antaŭ tre longa tempo Yifeng estis movoplana urbeto. En 1855 la Flava Rivero breĉiĝis ĉe la proksima loko Tongwaxiang norde de la urbeto, kaj akvo inundis la tutan urbon. Post forfluo de la akvo la fluejo sekiĝis kaj fariĝis dezerto kun sal-alkalaj kampoj etendiĝantaj sepcent kilometrojn. La loko estas konata kiel la malnova fluejo de la rivero, kiu tiam trairis Lankao kaj Yifeng.

La breĉigo de la rivero tute ŝanĝis la fizionomion de tiu prospera loko kaj la multfojaj superakvegoj alportis al la loko

grandan kvanton da ŝlimo kaj sablo, tiel ke elrigardis nur la suproj de iuj domoj. Regis plena dezerteco. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio rifugiĝintoj revenis al sia hejmvilaĝo kaj penis kulturaj disajn kampojn, sed la kampoj fariĝis sablaj dunaj kampoj tuj post kiam ekblovis ventego, kaj la loĝantoj drogis denove en malriĉeco kaj malfeliĉo.

Mia aŭto eniris la malnovan fluejon de la rivero. Mi rigardis tra la antaŭfenestro de la aŭto kaj miregis pro du vicoj da altaj poploj ambaŭflanke de la ŝoseo kaj tritikaj kampoj kiuj kuŝis malantaŭ ili kaj en reto de kontraŭventaj arbarzonoj. Pli malproksime, oni sterkis kaj akvumis tritikajn kaj legomajn kampojn... Novaj loĝdomoj sin kaŝis en verda arbaro. Vidinte ĉion ĉi, kiu povus kredi, ke antaŭe sterniĝis sal-alkalaj kampoj kaj sablejoj sur tiu malnova fluejo de la rivero?

“Jen la ŝtata hortikulturejo Yifeng” diris al mi la ŝoforo.

Jes, maldekstre de la ŝoseo prezentiĝis granda prospera fruktogardeno kaj vinbergardeno kun multaj betonaj fostoj. Kaj min bonvenigis la kulturejestro. Li

diris al mi: “Se frue vi venus, vi vidus la rikoltadon de vinberoj kaj pomoj.”

“Kiom da fruktarboj troviĝas en la malnova fluejo de la rivero?” mi demandis.

“Mi ne povas doni precizan ciferon. Sole la pomarboj kovras areon de pli ol 166 000 hektaroj.”

Ĉiu komenco estas malfacila. Li ekkonigis al mi la fondiĝon de la hortikulturejo. Tiam oni portis tendojn al tiu loko. Revenis kamparanoj migrintaj al aliaj lokoj, informiĝinte, ke la popola registaro fondos ŝtatan hortikulturejon kaj donos al tiuj, kiuj volantas labori en la kulturejo, monon por konstrui loĝdomon.

En la unuaj jaroj la kulturejo havis grandajn malfacilojn. Oni unue fosis putojn, kulturis legomojn kaj konstruis barakojn por aranĝi sian vivon. Poste oni fosis kanalojn, senherbigis kaj plugis kampojn, kreskigis grenon kaj fruktarbojn. Oni ankaŭ sendis lerni sperton kaj teknikon de aliaj avangardaj ŝtataj terkulturejoj.

La hortikulturejo Yifeng troviĝas en regiono, kie regas seka klimato. Ĉar la tero estis kovrita

sojfabo, rizo, sorgo, aŭtuna brasiko kaj lino. Ilia kultura areo atingis 466 600 hektarojn. La kultura areo de la nova specio

de sojfabo “Heilong-26” radie selektita atingis 700 000 hektarojn, kiuj povas pliprodukti ĉ. 100 000 tunojn da sojfabo.

Krome, la esplorado pri radia konservado de grenoj, viandoj, legomoj kaj fruktoj ricevis certan sukceson.

VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (6)



Vasta kampo sur malnova fluejo de la Flava Rivero

de dika tavolo da sablo, dum ventado nenio estis videbla ekster nur kelkaj paŝoj. En tiu situacio la hortikulturistoj plantis arbaron kontraŭ ventado por senmovigi movsablon, akceli akvoutiligon kaj venki sekegecon. Samtempe ili kulturis plantojn, kiel luzerno, por organika sterko, por fekundigo de kampoj kaj por furaĝo kun bruta sterko kiel sekvo. Ili klopodis koni la leĝon pri plantado en sabla loko kaj postuli grenon de la tero. Ili diligente laboris multajn jarojn kaj fine faris reton de kontraŭventa arbaro kun areo de 2 400 hektaroj, fosis irigaciajn kaj

drenajn kanalojn interkruciĝantajn kaj turnis pli ol 2 660 hektarojn da sablejoj en kampojn, kies kvaronon kovras fruktoĝardeno.

Ni interparolis kaj nerimarkite atingis la ofidomon de la hortikulturejo. Oni kondukis min en la akceptejon. Ĝi estis simple meblita, kio montris ilian ŝpareman vivmanieron. La muroj estis plenaj de silkaj honorflagetoj kaj meritoatestoj. Meze sur la muro kontraŭ la pordo pendis la kadrita meritoatesto "AL LA PLEJ AVANGARDA ORGANIZAĴO DE SOCIALIS-

MA AGRIKULTURO EN LA LANDO" kun stampo de la nacia emblemo, kiun donis al ili la Stata Konsilantaro.

Mi sidiĝis ĉe tablo, sur kiu kuŝis du pladoj da pomoj kaj vinberoj parfumantaj la tutan akceptejon. Oni eksportas tiajn pomojn nomatajn Daxu kun ŝelo flave ruĝeta. Ankaŭ la vinberoj estas de plaĉa koloro. La kulturejstro diris, ke la gubernia vinfarejo elpremas la sukcon el tiaj vinberoj, kiu vendiĝas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en Japanio, FR Germanio kaj aliaj landoj. Je tio li prezentis al mi vinberan sukcon por gustumi, inter kiu 30% estas sukero. Estas granda la temperaturo diferenco inter tago kaj nokto en la malnova fluejo de la rivero, kio favoras la kreskadon de vinberoj.

La sekvan tagon mi adiaŭis la gastaman mastron kaj daŭrigis mian vojaĝon en la gubernio Lankao laŭ la malnova fluejo de la rivero.

Eble iuj el niaj legantoj ankoraŭ memoras la gubernion, ĉar en la kvara numero de EPC, 1966, publikiĝis la raporto "Modelo por Guberniaj Partisekretarioj", kiu detale informis, kiel Jiao Yulu (Giao Julu) la tiama partisekretario de Lankao, kune kun lokaj kamparanoj batalis kontraŭ vento kaj sablo por forigi malriĉecon. Forpasis pli ol dek jaroj. Pro la malbonegaj naturaj kondiĉoj kaj la kaoso de la dekjara kultura revolucio la kamparanoj de Lankao ne liberiĝis de malriĉeco kaj ĉiujare pli ol 20 000 homoj migris al aliaj lokoj. Eĉ en 1978 la 520 000 loĝantoj de la gubernio

VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (6)

devis konsumi dek milionojn da kilogramoj da greno liverita de la ŝtato, pruntepreni du milionojn da juanoj el la ŝtata banko kaj akcepti monhelpon de pli ol 700 000 juanoj.

Rimarkinda ŝanĝiĝo okazis al Lankao dum la lastaj tri jaroj, kiam en la kamparo oni praktikis la respondecan sistemon de produktado, laŭ kiu oni donas laborpagon laŭ laborkvanto. En 1979 Lankao havis rekordan grenan produktokvanton de 140 milionoj da kilogramoj. La kamparanoj ne nur solvis la problemon de malsato, sed eĉ vendis al la ŝtato pli ol 1.5 milionojn da kilogramoj da greno. Kaj en la sekva jaro la gubernio produktis 156 milionojn da kilogramoj da greno. Dum mia vizito mi informiĝis, ke la grena produktokvanto de tiu loko en 1981 estis 175 milionoj da kilogramoj. Por pli bone koni la situacion en la kamparo de Lankao, mi speciale vizitis la produktan brigadon Yuzhai de la popolkomunumo Chengguan.

La brigado troviĝas en la samnoma vilaĝo ombrata de verdaj arboj. Ĉie en la vilaĝo estis novaj brikaĵaj domoj kaj malnovaj pajlaj domoj. Pluraj dom-bazoj estis faritaj kaj apude estis amasigitaj brikoj kaj ligno.

Mi pririgardis la vilaĝon, akompanate de Bi Zhenhua, respondeculo de la brigado. Li diris al mi, ke la vilaĝo havas 400 hektarojn da sablaj kampoj. En la pasintaj jaroj ĝi havis mizeran produktokvanton de greno. Dum la tri jaroj de 1976 ĝis 1978, la vilaĝanoj konsumis 455 000 kilogramojn da greno

aĉetita ĉe la ŝtato. En la printempo de 1979 la brigado aĉetis grandan traktoron, kiu plugis ĉiujn sablajn kampojn de la vilaĝo. Post tio la produktaj taĉmentoj kunvokis la vilaĝanojn por interkonsiliĝi pri laboro kaj fine decidis praktiki respondecan sistemon de produktado. Ili distribuis la agroj de la vilaĝo al ĉiuj familioj por kulturi, laŭ iliaj malsamaj cirkonstancoj, kiel la fekundeco kaj distanco de agroj kaj la nombro de familioj kaj laborkapabluloj. La vilaĝanoj nomas tian sistemon "sistemo fiksi laborkvoton sur-

baze de familio". La plano por plantado devas esti ellaborita, kiel kutime, de la produkta taĉmento. La kolektivo havas posedrajton pri la tero kaj la grandaj agrikulturaj maŝinoj. La kamparana familio devas fari kontrakton kun sia taĉmento pri tio, kiom da agroj ĝi faras, kiom da imposto ĝi devas pagi al la ŝtato en la sama jaro, kiom da mono ĝi devas doni al la taĉmento por la kolektiva akumulo, publikaj intereso kaj aliaj uzoj, kaj kiom da greno, oledonaj plantoj, kotono, porkoj, kortobirdoj kaj ovoj ĝi devas vendi

Pomarbaro sur malnova fluejo de la Flava Rivero



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (6)

al la ŝtato (kontraŭ kio la familio ricevas monon por si mem), kaj krome, ankaŭ la ceteraj agrikulturaj produktaĵoj kaj la akirita mono apartenas al la familio mem. La familioj de mal-sanaj, debilaj kaj kriplaj kamparanoj vivas el la akumulita mono de sia taĉmento. Mi vidis, ke la sistemo fiksi laborkvoton surbaze de familio praktikata de tiu brigado estas unu el la respondecaj agrikulturaj sistemoj nun praktikataj en la vasta ĉina kamparo. Bi Zhenhua daŭrigis, ke la praktiko de la brigado dum la tri jaroj montras, ke tiu rimedo levis la laborentuziasmon kaj laborefikon de la kamparanoj. Tion konstatis mia vizito al la familio de Liu Tinghe, kamparano de la Kvina Produkta Taĉmento.

Liu estas tipa, simpla kaj diligenta maljuna kamparano. La


kamplaboro dum multaj jaroj faris sulkojn sur lia vizaĝo. Lin surprizis mia vizito. Kiam mi demandis lin pri lia vivo dum la lastaj jaroj, li ne povis deteni sin de ekscitiĝo kaj lia parolo ektorentis.

Lia tuta familio konsistas el dek membroj, en kiuj kvar kapblas labori. En 1975 kaj 1976 iuj el la familio forlasis la hejmon kaj migris aliloken. Sed nun lia familio ja fariĝis riĉa en la vilaĝo. En lia domo troviĝas sep lokoj por teni grenon kaj pli ol tridek sakoj plenaj de maizo, tritiko, sojfabo, arakido kaj jujubo. En 1981 lia familio farmis laŭ kontrakto tri hektarojn da agroj. Dekalkulinte la produktaĵojn liverotajn al la ŝtato, ili ricevis entute 3 000 kilogramojn da tritiko, 4 000 kilogramojn da maizo, 100 kilogramojn

da arakido, 15 kilogramojn da sezamo, 3 000 kilogramojn da sojfabo, 250 kilogramojn da aliaj grenoj, 300 kilogramojn da jujuboj kaj 1 000 kilogramojn da babato. Nun la familio bredas du mulojn, tri bovojn kaj kvar porkojn. Krome ili ankaŭ plektas korbojn, per kio ili enspezas pli ol 200 juanojn ĉiujare. La mastro aldonis, ke lia familio havas novajn brikajn domojn kun dek kvin ĉambroj. Dum la lastaj tri jaroj ili aĉetis du biciklojn, tri brakhorloĝojn, du kudromaŝinojn kaj unu radioricevilon.

En la gubernio Lankao riĉiĝis ne sole la familio de Liu. Ke dum la lastaj du jaroj kamparanoj de Lankao konstruis novajn brikajn domojn kun pli ol 100 000 ĉambroj, tio montras rimarkindan ŝanĝon en la vivo de la popolo en la malnova fluejo de la rivero.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Changzhou
3. Lankao
4. Yiyang
5. Sanhajo
6. Wuxi
7. Suzhou
8. La Tongdao-a Dunganacieca Aŭtonoma Gubernio

MITA RAKONTO EN BILDOJ

Sun Vukong Trifoje Batis Skeletospiriton

La rakonto estas fragmento citita el la fama ĉina mita romano *Pilgrimado al la Okcidento*. Survoje la bonzo Tang Seng kun siaj tri disĉiploj renkontis hommanĝantan Skeletospiriton, kiu trifoje aliformiĝis en homan figuron por trompakiri la bonzon kaj ĉiufoje estis malkaŝita de la simio Sun Vukong, la unua disĉiplo de la bonzo. Sed trompite de la spirito Tang Seng forpelis Sun kaj sekve falis en la manojn de la spirito. Kiu fine savis lin? Bonvolu legi la libron. La bildoj estas pentritaj tre delikate laŭ tradicia ĉina pentrmetodo.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino

Numero: 88-Es-85P 17 X 25cm. 118 pĝ.

Prezo: £0.45 US\$0.90

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Peranto de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de la

Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj
(GUOJI SHUDIAN),


P.O. Kesto 313,

Beijing, Ĉinio

Sun Vukong
Trifoje Batis
Skeletospiriton

CHENG ZHIMING:

La Ĉina Volana Teamo gajnis Thomas-Pokalon



*Sun Zh'an (la fronta) kaj
Yao Ximing en ekzercado*

LA 12-a Monda Volana Ĉampioneca Konkurso por Viroj (Thomas-Pokalo) okazis en Londono en majo ĉi-jare. La Ĉina Volana Teamo, kiu unuafoje partoprenis en tia konkurso, venkis en la finalo la potencan Indonezian Volanan Teamon kaj gajnis Thomas-Pokalon.

La unua tia konkurso okazis en 1949. Kaj ekde tiam ĝi okazas ĉiun trian jaron. La indonezia teamo gajnis la ĉampionecon sepfoje kaj la malazia teamo kvarfoje. Do kia estas la Ĉina Volana Teamo, kiu unuafoje gajnis Thomas-Pokalon?

KONKURSADO EN LONDONO

Vespere de la 21-a de majo la memorhalo Albert ĉe la parko Hyde estis iluminata. Ĉiuj sidlokoj estis okupitaj de spektantoj, ili atendis la finalan batalon

inter la Ĉina Volana Teamo kaj la Indonezia Volana Teamo. En tiu tago la situacio estis malfavora al la ĉina teamo, ĉar en la unua tago de la finala konkurso la ĉina teamo ne bone elvolvis sian teknikon kaj postigis post la indonezia teamo per 1:3. Se la indonezia teamo gajnus du el la kvin ludoj de la sekva tago, ĝi gajnus la ĉampionecon.

Unue konkursis la ĉina sportisto Luan Jin kaj la indonezia sportisto Rudy Hartono, okfoja gajninto de la vira unuopa ludo de la Tut-anglia Volana Ĉampioneca Konkurso. En la unuaj du matĉoj Luan Jin kaj Hartono gajnis po unu matĉon. En la decida tria matĉo ili ludis tre intense, kaj kelkiam ili ankaŭ devis frapi la volanon dekon aŭ dekojn da fojoj por gajni unu poenton. Fine Luan Jin venkis kaj per tio gajnis valoran poenton por la ĉina teamo.

La sekva ludo okazis inter Han Jian kaj la indonezia ĉefa volanisto Liem Swie King. Tuj post la komenciĝo de la matĉo Han Jian faris senĉesan atakon anstataŭ sian kutiman defensivon kaj gajnis la unuan matĉon. Liem gajnis la duan matĉon. En la decida tria matĉo, la poentaro estis 14:9 favore al Han Jian. Liem faris grandan penon kaj egaligis la poentaron per 14:14. Sufoka streĉiteco regis en la tuta halo. En la grava momento de aldona konkurso por tri poentoj Han Jian venkis Liem per 17:14.

La proporcio de la totala poentaro de la ĉina kaj indonezia teamoj estis 3:3. La indonezia teamo ŝanceliĝis pro malvenkoj de siaj ĉefaj sportistoj, dum la ĉina teamo antaŭeniris en venko. Chen Changjie per 2:0 venkis Lius Pongoh, promesplesnan junan volaniston de la in-

donezia teamo. En la tuj sekva duopa ludo la ĉinaj volanistoj Sun Zhi'an kaj Yao Ximing elpaŝis kontraŭ la indoneziaj volanistoj Kartono kaj Rudy Hersyanto, gajnintoj de la ĉampioneco de duopa ludo en la Tutanglia Volana Ĉampioneca Konkurso. En la ludo la ĉinaj volanistoj venkis la indoneziajn per 2:1. Ĝuste en tiu ĉi momento leviĝis tra la tuta halo surdiga aplaŭdado kaj kriado.

NEFORGESEBLA POENTARO DE 6:44

Pro la venko la ĉina teamo estas rigardata kiel forto subite leviĝinta. Tio tamen ne estas hazarda, ĉar la teamo iris zigzagan vojon.

En 1956 la Indonezia Volana Teamo kiel la tiama ĉampiono vizitis Ĉinion. En la konkurso de 50 matĉoj la ĉinaj sportistoj gajnis nur ses matĉojn kaj perdis 44 matĉojn, kio montris, ke la diferenco de tekniko inter la du teamoj estis tre granda. En 1959 iuj ĉinaj elmigrintoj-volanistoj revenis hejmlandon. Ili estis Fang Kaixiang, Hou Jiachang, Tang Xianhu k.a. kaj poste fariĝis ĉefaj volanistoj de la ĉina teamo. La ĉina volana teamo reformis sian trejnan metodon. Ili iom post iom formis sian originalan stilon de rapida movo, forta atako, trafa batado kaj varia taktiko. En 1963 la Ĉina Volana Teamo unuafoje montris sian nivelon en la sportkunveno okazigita en Ĝakarto kaj gajnis la ĉampionecon de vira unuopa ludo. Poste la ĉina volana teamo plurfoje venkis la indonezian kaj danan teamojn.

LA TEAMO TIMANTA NE- NIAN MALVENKON

En 1966, kiam la ĉina teamo troviĝis en sia prospera periodo,

okazis la kultura revolucio. La volana sportado estis atakata kaj stagniĝis.

En la komenco de la sepdekaj jaroj revigliĝis la ĉina volana sportado. Kvankam la famaj sportistoj tiutempe superis la aĝon de 30 jaroj, tamen por vigligi la volanan sportadon de Ĉinio, ili tutanime partoprenis en trejnado. En la Sepa Azia Sportkunveno okazigita en 1974 kaj postaj volanaj konkursoj de Azio, la ĉina teamo venkis fortajn teamojn.

Sed, en ĉiuj finaloj de la volana konkurso de la Oka Azia Sportkunveno okazigita en decembro 1978, la ĉina teamo estis venkita de la indonezia teamo. La kaŭzo de la malvenko kuŝis ĉefe en tio, ke la ĉina teamo estis en transpasa periodo, la veteranaj sportistoj forlasis volanan konkurson kaj la novaj sportistoj ankoraŭ ne maturiĝis en tekniko.

Analizante la disvolviĝan tendencan de la internacia volana sportado kaj la mankojn montritajn de la ĉina teamo en la Oka Azia Sportkunveno, la ĉinaj volanaj trejnistoj faris apartan trejnadon al la junaj volanistoj.

La 22-jara ĉina volanisto Han Jian partoprenis en la volana konkurso de la Oka Azia Sportkunveno. Pro sia malrapida movo kaj malforta ofensivo en konkurso li penegis ekzercis sin en daŭrpovo kaj rapideco. Por altigi la rapidecon de atako en defensivo li ofte ekzercadis sin per unu kontraŭ du personoj 50 minutojn kaj laciĝis tiel, ke li eĉ ne povis frapi volanon. Tiel li fariĝis unu el la elstaraj junaj volanistoj de la ĉina teamo.

Ankaŭ la ĉinaj volanistoj de duopa ludo forigis en trejnado

sian malfortajn. Ili fortigis siajn kunlaboradon kaj povon kontraŭ ludmaniera ŝanĝo de rivaloj en konkurso.

AL VENKO

Ekde 1979 la ĉina teamo partoprenis en kelkaj internaciaj konkursoj kaj montris siajn fortojn. Februare de 1980 la ĉina kaj indonezia teamoj konkuris en Singapuro. Tiufoje ambaŭ flankoj sendis siajn plej bonajn volanistojn. La ĉinaj junaj sportistoj obstine batalis kontraŭ la rivaloj kaj venkis per 5:4.

En 1981 ĉinaj volanistoj partoprenis en la volana konkurso okazigita en Usono. La 23-jara ĉina volanisto Chen Changjie gajnis sinsekve kvin ludojn kaj fariĝis la ĉampiono de vira unuopa ludo. Kaj paro da ĉinaj volanistoj gajnis la oran medalon de duopa ludo.

En marto ĉi-jare la ĉina teamo partoprenis unuafoje en la Tutanglia Volana Ĉampioneca Konkurso. Kvankam la ĉina teamo akiris ne tre kontentigan sukceson en la konkurso, tamen kvin ĉinaj volanistoj viciĝis en la unuajn ok lokojn de vira unuopa ludo kaj kvar paroj da ĉinaj volanistoj viciĝis en la unuajn ok lokojn de vira duopa ludo.

La venko akirita en la 12-a Monda Volana Ĉampioneca Konkurso estas por la ĉinaj volanistoj gratulinda. Tamen ili ne estas fieraj kaj sentas la venkon akirita nefacile. Vizaĝe al la rapida kaj forta frapado kaj teknika perfektigo disvolviĝantaj en la mondo, ili decidis modeste lerni de aliaj eminentaj volanistoj kaj ekzerci sin daŭre por akiri pli grandajn sukcesojn.





ĈINIO GAJNIS LA VOLANAN ĈAMPIONECON EN THOMAS- POKALA KONKURSO

La Thomas-pokala konkurso estas la plej altnivela volana konkurso de la mondo. La 12-a Monda Volana Ĉampioneca Konkurso de Thomas-pokalo havis lokon en Londono, Britio. En ĝi la ĉina teamo, kiu la unuan fojon partoprenis en tia konkurso, venkis per 5:4 la indonezian teamon, kiu sepfoje gajnis la pokalon.


Thomas-pokalo





La brita reĝino Elizabeto la Dua manpremas kun la ĉinaj volanistoj.



La konkurso inter la ĉinaj kaj indoneziaj volanistoj






Triumfa reveno al Pekino



La ĉina volana teamo



Trejnistoj de la brita teamo gratulas ĉinajn volanistojn.



Vortfaradoj de Esperanto kaj la ĉina lingvo

de ZHU XUELI

EN Esperanto troviĝas granda nombro da kunmetitaj vortoj. Trafe diris G. Waringhien kaj K. Kalocsay: "... la kunmetado estas en ĝi (Esperanto) la esenca rimedo de vortfarado."* Ankaŭ en la ĉina lingvo, la nombro de kunmetaĵoj kelkoblas kompare kun tiu de simplaj vortoj. Jen estas la plej okulfrapa simileco inter la du lingvoj, kaj per tio ili diferencas de ĉiuj ĉefaj lingvoj en Eŭropo.

En vortkunmetado jenaj kvar formoj ofte vidiĝas en Esperanto, kaj ankaŭ en la ĉina lingvo:

(1) determinanta + determinata

Esp-a	vesper-	+ mang-	= vespermanĝ-
ĉina	晚	+ 餐	= 晚餐
ĉina fone-	wǎn	+ cān	= wǎncān
tika trans-			
skribo			
Esp-a	reĝ-	+ palac-	= reĝpalac-
ĉina	王	+ 宫	= 王宫
ĉina fone-	wáng	+ gōng	= wánggōng
tika trans-			
skribo			

(2) klarigata + klariganta

Esp-a	kap-	+ dolor-	= kapdolor-
ĉina	头	+ 疼	= 头疼
ĉina fone-	tóu	+ téng	= tóuténg
tika trans-			
skribo			
Esp-a	ter-	+ trem-	= tertrem-
ĉina	地	+ 震	= 地震
ĉina fone-	dì	+ zhèn	= dìzhèn
tika trans-			
skribo			

(3) agricevanta + aganta

Esp-a	kultur-	+ ter-	= terkultur-
ĉina	种	+ 地	= 种地
ĉina fone-	zhòng	+ dì	= zhòngdì
tika trans-			
skribo			
Esp-a	batal-	+ taŭr-	= taŭrbatal-
ĉina	斗	+ 牛	= 斗牛
ĉina fone-	dòu	+ niú	= dòuniú
tika trans-			
skribo			

(4) kompletigata + kompletiganta

Esp-a	vid-	+ klar-	= klarvid-
ĉina	看	+ 清	= 看清
ĉina fone-	kàn	+ qīng	= kànqīng
tika trans-			
skribo			
Esp-a	tord-	+ streĉ-	= streĉtord-
ĉina	拧	+ 紧	= 拧紧
ĉina fone-	níng	+ jǐn	= níngjǐn
tika trans-			
skribo			

Ankaŭ malsameco troviĝas inter la ĉinlingva kaj Esperanta vortfaradoj. Ĝi montriĝas jene:

Unue, vidu la formojn (3) kaj (4): en la ĉinlingvaj kunmetaĵoj, la unua radiko estas ĉefa elemento kaj la dua estas flankelemento. Tio malas al Esperanto, kiu ĉiam prenas la postan kiel la ĉefan. Do oni povas kompreni kial en la formoj (3) kaj (4) la du radikoj de Esperanta kunmetaĵo estas inversaj al tiuj de la ĉina, kvankam en (1) kaj (2) ilia ordo estas sama.

Due, ne ĉiam paralelas la vortkonstruaj formoj de Esperanto kaj la ĉina lingvo. La vorto "vagonaro" (trajno) en la ĉina lingvo estas "火车" (huǒchē), t.e., vorto kun du radikoj: "huǒ" (fajro) kaj "chē" (veturilo) — veturilo movata per fajro (akvovaporo), dum "tramo" estas "电车" (diànchē), laŭradike "elektra veturilo". Tiuj du veturiloj en la ĉina lingvo estas tipaj kunmetaĵoj de la formo "determinanto + determinato", sed en Esperanto oni preferas formon simplan. Aliaj ekzemploj:

Esp-o	simpla vorto	hont-
	kunmetaĵo	脸红 liǎnhóng
la ĉina lingvo	senco de la du radikoj	vizaĝ- + ruĝ-
	formo de vort- kunmeto	(2)
Esp-o	simpla vorto	manifestaci-

la ĉina lingvo	kunmetaĵo	示威 shīwēi
	senco de la du radikoj	montr- + fort-
	formo de vort- kunmeto	(3)
Esp-o	simpла vorto	renversi
la ĉina lingvo	kunmetaĵo	推倒 tuīdǎo
	senco de la du radikoj	puŝ- + fal-
	formo de vort- kunmeto	(4)

Trie, krom la supre diritaj kvar formoj, estas ankaŭ alia formo en la ĉina lingvo, nome la kombino de du radikoj kun senco sama, parenca aŭ kontraŭa. Tiu formo tre maloftas en Esperanto, kiel ekzemple surd-muta (parenca), nigra-blanka (kontraŭa), tag-nokte (kontraŭa), pli-malpli (kontraŭa) ktp. Sed ĝi abundas en la ĉina lingvo:

图画(túhuà) = bildo 语言(yǔyán) = lingvo
 跳跃(tiàoyuè) = salti 奔跑(bēnpǎo) = kuri
 喜悦(xǐyuè) = ĝojo 恐惧(kǒngjù) = timo

Jen ĉiuj estas kunmetaĵoj ĉinlingvaj respondaj al simplaj vortoj Esperantaj. La du radikoj en la ĉina lingvo estas samsencaj.

Aliflanke, en multaj okazoj oni uzas du Esperantajn simplajn vortojn por traduki ĉinlingvan kunmetaĵon, precipe kiam la lasta havas radikojn parencajn unu al la alia aŭ malajn unu kontraŭ la alia. La kunmetaĵo “书刊”(shūkān) fariĝas en Esperanto “libroj kaj gazetoj”, “杯盘”(bēipán) — “taso kaj telero”.

Kelkaj tiaj ĉinlingvaj kunmetaĵoj havas sencon tute abstraktan, en Esperanto oni ilin esprimas ankaŭ per simpla vorto, sed aldonante “-ec-”:

大小(dàxiǎo) — granda + malgranda — grandeco
 长短(chángduǎn) — longa + mallonga — longeco
 深浅(shēnqiǎn) — profunda + malprofunda —
 profundeco

Aliaj tiufarmaj ĉinlingvaj kunmetaĵoj ŝajnas iom interesaj:

尺寸(chǐcùn) — futo + colo — dimensio
 口舌(kǒushé) — buŝo + lango — vortoj
 天地(tiāndì) — ĉielo + tero — mondo (aŭ ĉirkaŭaĵo)
 手脚(shǒujiǎo) — mano + piedo — movoj

En la ĉina lingvo, tiuj vortoj, ofte uzataj figure aŭ metafore, ankoraŭ konservas la originajn sencojn de siaj du radikoj, kiuj estas proksimaj ankaŭ al la senco de Esperantaj vortoj.

Post la kunmetaĵoj ni turnu nin al la derivaĵoj: radiko + afikso.

Kiom da afiksoj troviĝas en Esperanto? En sia libro “Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto” P. Fruictier kaj S. Grenkamp-Kornfeld listigis 86, inkluzive de prepozicioj kiuj funkcias kiel afiksoj.

Kiom da afiksoj troviĝas en la ĉina lingvo? Pli ol kvindek. Inter ili kelkaj estas propraj al la ĉina lingvo, kaj preskaŭ duono estas identa kun iuj en Esperanto, kiel ekzemple:

无(wú) = sen	不(bù) = ne
非(fēi) = ne	反(fǎn) = kontraŭ
伪(wěi) = pseŭd-	自(zì) = mem, sin
前(qián) = antaŭ	超(chāo) = ultra
半(bàn) = semi, duon	单(dān) = unu
多(duō) = plur	者(zhě) = -ist-
家(jiā) = -ist-	师(shī) = -ist-
员(yuán) = -an-	物(wù) = -aj-
具(jù) = -il-	器(qì) = -il-
性(xìng) = -ec-	化(huà) = -ig-
学(xué) = -ologi-	论(lùn) = -ism-

Multaj vortoj derivitaj per ili en la du lingvoj montriĝas identaj kaj en formo kaj en strukturo.

En la du lingvoj multaj afiksoj povas esti uzataj memstare. Mi citu ekzemplon el PIV:

ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro
 器具用金做适合每样活
 qìjù yòng jīn zuò shìhé měiyàng huó

ankaŭ la ĉinan proverbon:

工	欲	善	其	事
gōng	yù	shàn	qí	shì,
se laboristo volas sukcesigi sian taskon,				
必	先	利	其	器
bì	xiān	lì	qí	qì.
li devas unue bonigi siajn ilojn.				

“Ilo” en la ĉina lingvo estas “器”(qì) aŭ “具”(jù), nun ĝi “vortiĝas” memstare en la frazo kaj en Esperanto kaj en la ĉina lingvo. Krome, la sufiksoj -uj- (ĉina: 盆 pén), -ism- (ĉina: 论, 主义 lùn, zhǔyì), -estr- (ĉina: 头 tóu), -id- (ĉina: 崽, 仔 zǎi) ĉiuj funkcias same.

En ambaŭ lingvoj, kelkaj afiksoj povas esti ankaŭ kombinitaj por naski novajn vortojn, ĉar ili havas la “memstarecon”.

R. TRIOLLE (Francio):

Ĉu SUK ĉesos aŭ sukcesos?

EN la Esperanto-medio, kiam iu pensas pri scienco aŭ scienca literaturo, tuj venas en lian menson la asocio sen profita celo Someraj Universitataj Kursoj. Kial? Tion ni studu tra dek jaroj da historio.

Fondiĝo: grupo da universitataj tanoj sentis la bezonon de sendependa asocio, kies celo estu organizi laborsesiojn en la internacia lingvo Esperanto por disponigi al studentoj de la tuta mondo la eblecon studi pere de Esperanto, pruvi al universita-

tanoj, ke la internacia lingvo plene taŭgas por instrui la plej fakajn kursojn, kaj ellabori ĉicele fakan lingvon. Sub prezido de belga pedagogo, prof. Natalis, fondiĝis en 1972 la asocio SUK.

Labormetodoj: la membroj (homoj, kiuj pagas jaran kotizon de 750 bf por subteni la ĉi-suprajn celojn) elektas ĉiun trian jaron kvinpersonan estraron. Tiu estraro, kiu ĝis nun konsistis el minimume tri naciecoj, kunvenas regule, prefere en Liege

(Belgio). Grava problemo por SUK estis kaj restas trovi enlandajn kunlaborantojn, kiuj pretas informi evidente la esperantistojn pri la agado de SUK, sed prefere la studentojn kaj universitatanojn, kiuj alfrontas lingvo-problemojn. Estas bone sciate, ke inter la apero de scienca libro kaj ties traduko en alian lingvon pasas ofte kelkaj jaroj, tiel ke la sciitaĵoj kaj esploroj ne plu estas aktualaj, kiam ili atingas alilingvanon.

Someraj sesioj: ĝis nun la plej videbla agado de SUK restas la okazigo de someraj sesioj. Jam estis organizitaj kvin (unu en Antverpeno, kaj kvar en Liege). Ili grupigis universitatajn lekciistojn kaj studentojn el pluraj landoj kaj eĉ kontinentoj. Jam lekciis profesoroj el Japanujo, Usono, Kanado, Argentino, Pollando, Hungario, Bulgario, Francujo, Belgujo, Germanujo, Britujo kaj Aŭstrujo. Krom la

ebl- 可能 (kěnéng) ec- 性 (xìng)
eblec- 可能性 (kěnéngxìng)
et- 小 (xiǎo) ul- 人 (rén)
etul- 小人 (xiǎorén)

Afiksoj sin trovas en multaj lingvoj de la mondo. Sed nur en Esperanto kaj la ĉina lingvo, ili pompe floras per siaj sistema kompleteco kaj multampleksa utileco.

Plej rimarkinde estas, ke la Esperanta vortfarado akceptis la regulon de simpla aglutino. Ĝiaj vortelemantoj restas ĉiam senŝanĝaj, — ĉu radiko kun radiko, ĉu radiko kun afikso, ĉu afikso kun afikso. Tute same estas en la ĉina lingvo.

Sed ne estas tia la plejparto de la ĉefaj lingvoj en la Okcidento. En la lingvoj angla, franca, slavaj, itala, germana, hispana kc. la derivado ofte kaŭzas fleksiojn de radikoj.

Ne estas tia la plejparto de la ĉefaj lingvoj en la Oriento. En la lingvoj japana, korea, mongola, turka kc. la derivado ofte kaŭzas formŝanĝojn de afiksoj, kvankam la radikoj en tiuj lingvoj restas senfleksiaj.

Ĉinoj prenas Esperanton por fremdlingvo je la unua rigardo. Tio estas komprenebla, ĉar la “fremdlingvoj” en iliaj okuloj ĝenerale signifas lingvojn el la hindeŭropa familio, ĝuste de kiu devenis la Esperantaj vortoj kaj ilia prononco. En ĉiu ajn lingvo la vortoj kaj prononco estas elementoj supraĵaj, dum la gramatiko (morfologio, sintakso ktp.) estas tamen baza kaj fundamenta. Sen la vojo de Esperanto-lernado, ju pli antaŭen iras ni ĉinoj, des pli ni sentas Esperanton ŝajne konata; ju ni progresas al pli alta nivelo, des ni sentas la lingvon pli familiara. Kial? Unu el la kaŭzoj estas tio, ke la gramatikoj de Esperanto kaj la ĉina lingvo estas konformaj en ne malmultaj flankoj, precipe en la vortfarado. Gramatika komparado inter la du lingvoj utilas al la plivastigo de Esperanto en Ĉinio.

Faktoj pruvas, ke la Esperanta gramatiko havas la karakterizaĵojn de multaj ĉefaj lingvoj tiel en la Okcidento kiel en la Oriento. Tio enkorpigas la internaciecon kaj la neŭtralecon de Esperanto.

*Vidu “Plena Analiza Gramatiko de Esperanto”, p. 275, UEA, 1980

kursoj, kiuj okazas prefere matene, estas organizitaj diskutgrupoj pri terminologio, studvizitoj al muzeoj, laboratorioj ktp, renkontiĝoj kun belgaj fakuloj, filmprezentoj ktp. Ĝenerale tuttaga ekskurso estas organizita (ekz. al la plej granda eŭropa teleskopo, piedekskurso tra birdrezervejo aŭ erikejo. . .) La sesio permesas ankaŭ konatiĝi kun la loka kulturo per vizito de muzeoj, prelegoj pri aliaj landoj, muzikaj vesperoj k.s.

Kaj la kursotekstoj? tuta serio (jam 37) da kursotekstoj aŭ kursokajeroj estis eldonita pri la traktitaj studdirektoj: medicino, biologio, kemio, matematiko, ekologio, literaturo, lingvistiko, pedagogio, sociologio, psikologio. Tiu giganta tasko postulata de la lekciistoj, kiuj devas liveri prespretan tekston, multe kontribuis al pliriĉigo de la scienca literaturo en Esperanto. Ofte ankaŭ fakvortaro estis ellaborita dum aŭ antaŭ la sesioj

per diversaj diskutoj inter la lekciistoj, samfakuloj kaj eĉ la studentoj. Eble necesas aldoni, ke sen la premo de la sesio, multaj ne estus verkintaj.

Ĉu SUK ĉesos aŭ ĉu SUK sukcesos? tiu jam fama slogano estas daŭre aktuala. SUK malsukcesis en la senco, ke ĝi ne plene kapablis informi la universitatajn mediojn en la diversaj landoj; ĝi malsukcesis en la senco, ke ankoraŭ nun multaj kapablaj esperantistoj ignoras ĝian ekziston kaj rolon, kaj sekve ne kapablas trafe informi interesotajn. Sed ĝi sukcesis koncerne al unu el siaj celoj: eldoni originale verkitajn sciencajn literaturon kaj lanĉi la bazon de internacia universitato. Se la rezultoj estas modestaj en Eŭropo, eble necesos ekstereŭropigi tiun specifan agadon. Laboro estis farita dum la lastaj dek jaroj; pli brilaj sukcesoj estu post dek jaroj dank' al ĉies kontribuo.

Ĉeestantoj de la Someraj Universitataj Kursoj



ESPERANTO-HORO FONDITA EN PEKINO

La 18-an de aprilo fondiĝis la Pekina Esperanto-Horo, konsistanta el membroj de la Pekina Esperanto-Asocio kaj kelkaj aliaj esperantistoj, kiuj scipovas kanti. Veterana esperantisto Lü Ji, prezidanto de la Ĉina Muzikista Asocio, funkcias kiel ĝia konsilanto; dramisto kaj komponisto Jin Ziguang, viceprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, kiel ĝia estro; Ren Zhaoxue, direktanto de la Ĉina Popteatra Trupo, kiel ĝia vicestro kaj direktanto; kaj Li Yuping, redaktoro de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino, kiel ĝia vicestro kaj instruisto.

LA DUA ESPERANTO-SIMPOZIO EN HEILONGJIANG

La 6-an de junio la Esperanta Esplora Grupo de la Fremdlingva Instituto de Heilongjiang-provinco okazigis en kunveno de la provinca Akademio de Sociaj Sciencoj la duan Esperanto-simpozion de 1982. Zhang Yan, viceprezidanto de la provinca Lingva Instituto, voĉlegis en la simpozio sian disertaĵon sub la titolo "Pri Esperanto kaj Ideografiaĵoj", kiu interesis la aŭskultantojn. Ankaŭ aliaj esperantistoj prezentis sian esplortemon kaj interŝanĝis opiniojn pri Esperanta laboro.

PORINSTRUISTA ESPERANTO-KURSO FINITA EN PEKINO

La porinstruista Esperanto-kurso, kune okazigita de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Fremdlingva Instituto, finiĝis en la komenco de julio. Antaŭtagmeze de la 7-a de julio oni okazigis ferman ceremonion. Oni jam decidis funkciigi similan kurson ekde septembro.

ESPERANTA RAPORT-KUNVENO EN CHANGSHA

La 17-an de junio la Esperanto-Asocio de Hunan kaj la biblioteko de la provinco kune okazigis Esperantan raportkunvenon en Changsha. Vicprezidanto de la asocio Yang Kaiyuan faris raporton sub la titolo "Lerni Esperanton, Koni la Mondon", kiu trovis aprobon ĉe pli ol kvarcent aŭskultantoj. En la kunveno donis parolon ankaŭ la provinca edukisto Liu Shouqi kaj la honora prezidanto de la asocio Shi Ping. Pri la kunveno raportis la provincaj televido- kaj radiostacioj, la Tagjurnalo de Hunan kaj la Vesperjurnalo de Changsha.

INFANA ESPERANTO-KURSO EN PEKINO

Por akiri sperton pri instruado de Esperanto al ĉinaj infanoj, la Pekina Esperanto-Asocio fondis kurson en la Pekina Lingva Instituto je la 1-a de marto. En la kurso lernas 24 kvar-jaraj infanoj. En la Internacia Infana Tago ili prezentis belajn programerojn en Esperanto kaj ricevis laŭdojn de respondeculoj de la lernejo kaj la gepatroj de ili.

Iras la Infana Esperanto-kurso



AMIKA KONTAKTO INTER ESP-ISTOJ DE TIANJIN KAJ KOBE

En majo ĉi-jare s-ro Yosihido Mizumasa, membro de la Konstanta Komitato de la Japana-Ĉina Amikeca Asocio de Hyogo, vizitis la ĉinan urbon Tianjin. Li kunportis al Esp-organizaĵo de Tianjin leteron de s-ro Nakamiti Tamihino, membro de la Konstanta Komitato de Esperanto-Societo de Kobe, kaj kvin japanajn literaturajn verkojn en Esperanto kiel donacojn. En la letero oni esprimis sian deziron, ke la Esperanto-organizaĵoj de la du amikaj urboj havu kontaktojn inter si. Ankaŭ la prepara grupo de la Esperanto-Asocio de Tianjin siavice donacis librojn. Samideanoj de ambaŭ urboj jam komencis korespondi.

LETEROJ AL "ĈINA TAGJURNALO" PRI ESPERANTO

Post kiam la anglalingva "Ĉina Tagjurnalo" (China Daily) (kiu eldoniĝas en Pekino) publikigis la informon pri la fondiĝo de la organizaĵo "Amikoj de Esperanto" en Pekino en la pasintjara decembro, eksterlanda leganto laboranta en Ĉinio skribis al la redaktoro de tiu ĵurnalo esprimante oponon kontraŭ

Esperanto kaj pledante por la disvastigo de la angla lingvo en Ĉinio. Sekve de tio angla kaj franca esperantistoj ambaŭ laborantaj en Ĉinio ankaŭ sendis leterojn al "Ĉina Tagjurnalo" elmetante proprajn opiniojn favore al Esperanto. Ekde tiam ĝis julio la ĵurnalo jam aperigis entute 12 leterojn de siaj legantoj pri la demando de Esperanto. 9 el ili estis skribitaj de ĉinaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj simpatiantoj de la Internacia lingvo.

INTERNACIA KOMPUTO-SCIENCA SIMPOZIO

La Komputo-sciencia Societo "Neumann Janos" organizos Internacian Komputo-sciencan Simpozion Interkomputo-82 sub aŭspicio de la Sciencia kaj Eldona Centro de UEA. Ĝi okazos en Budapeŝto, Hungario, inter la 27-a de decembro 1982 kaj la 2-a de januaro 1983.

Interkomputo-82 demonstros la teoriajn baz-esplorojn pri komputoscienco kaj la praktikan aplikadon de la komputo-tekniko por helpi la internacian fakan komunikadon. La Simpozio ankaŭ ligiĝos al la malfermo de la Internacia Jaro de Komunikado.

La laborlingvo de la simpozio estos Esperanto kaj la prelegoj aperos Esperante en presita formo.

KIBERNETIKA FAKREVUO KAJ LINGVOKIBERNETIKA LIBRO EN LA INTERNACIA LINGVO

La mondscale renoma lingvosciencia fakeldonejo Gunter Narr Verlag, Tübingen, FRG, kiu ĝis nun publikigis verkojn kaj revuojn en la germana, angla kaj franca lingvoj, ekaktivigis ankaŭ en la Internacia Lingvo. Ĝi ĵus eldonis "Lingvokibernetiko" (190 p.) de Frank Yashovardhan kaj Frank-Böhringer, kaj ekde 1982 aperas la kvaronjara

revuo "GrKG/Humankybernetik"
ankaŭ en la Internacia Lingvo.

REKOMENCIĜIS ESP-ELSENDOJ DE POLA RADIO

Post plurmonata paŭzo ekde la 13-a de decembro 1981 Radio "Polonia" (Varsovio) denove elsendas radiajn programojn en la Internacia Lingvo, kaj iĵ nun okazas kvinfoje tage anstataŭ trifoje kiel antaŭe. La duonhoraj elsendoj komenciĝas je la sekvantaj horoj laŭ GMT: 05h30, 11h00, 16h30, 19h30 kaj 21h30.

LA 60A GERMANA ESPERANTO-KONGRESO

De la 27-a ĝis la 31-a de majo okazis la Esperanto-kongreso de la Federacia Respubliko Germanio en Münster. Inter la 219 kongresanoj estis ankaŭ eksterlandanoj el 19 landoj. Ĝin partoprenis ankaŭ s-ino Isobe Yukiko el Japanio.

La malferman prelegon faris Rikardo Schulz pri "La lingvoproblemo en la landoj de la Eŭropa Komunumo". Laŭkutime oni aranĝis libroservon, ekspozicion, lingvo-ekzamenojn de la Germana Esperanto-Instituto, ekskursojn, balvesperon k.a.

ESPERANTO EN LA BRITA TELEVIDO

En la fruvespero de dimanĉo, la 23-a de majo 1982, aŭdiĝis en programo de la brita televido (BBC) la voĉoj de diversaj bone konataj esperantistoj. Inter ili estis d-rino Marjorie Boulton kiel biografo de d-ro Zamenhof, kaj d-ro John Wells el la fakto Fonetiko en la Universitato de Londono. La programo daŭris 45 minutojn. La verkinto de la programo estis Alan Wilding kaj la aferon organizis Brian Barker en la nomo de la Esperanto-Asocio de Britio.

La Esperanto-Centro en Londono post naŭ tagoj ricevis jam 700 leterojn, kies skribintoj ricevis i.a. la unuan lecionon de nova, senpaga, poŝta kurso.

MARINKO GJIVOJE

FORPISIS M. GJIVOJE

Kun profunda malĝojo ni subite informiĝis pri la forpaso de s-ano Marinko Gjivoje je la 31-a de majo post mallonga malsano. Li estis vere aktiva kaj sindonema esperantisto ne nur en Jugoslavio, sed ankaŭ internacie. Kiel peranto de "El Popola Ĉinio" li donis solidan helpon al ni kaj niaj legantoj en Jugoslavio. En tiu ĉi malĝoja

horo ni esprimas al la familianoj kaj kolegoj de s-ano Marinko Gjivoje koran kondolencon kaj esperas, ke ni ĉinaj kaj jugoslavaj esperantistoj kune daŭrigos la aferon postlasitan de la karmemora samideano per pli intima kunlaboro.

Redakcio de "El Popola Ĉinio"
Esp-a Sekcio de Guoji Shudian

LUCIJA BORCIĆ:

MARINKO GJIVOJE LABORANTA ĜIS LA LASTA VIVOTAGO

Marinko Gjivoje, unu el la plej elstaraj jugoslavaj esperantistoj, forpasis en Zagrebo la 31-an de majo 1982.

Li naskiĝis en Korĉula la 14-an de julio 1919.

Netakseblaj estas la meritoj de Marinko Gjivoje por la jugoslavia kaj la internacia Esperanto-movadoj. Kvankam malforta kaj malsanema, li verkis kaj laboris por Esperanto ĝis la lasta vivotago.

Marinko Gjivoje ekstudis agronomion, sed poste finstudis arkeologion. Liaj sciencaj verkoj el la kampo de speleologio estas rekonitaj kaj liaj metodoj monde aplikataj. Lia vivokupo tamen estis ĵurnalismo. Li estis publicisto, leksikografo, redaktoro de pluraj Esperantaj gaze-

toj, revuoj, organizanto de kunvenoj, kongresoj, prelegoj, gazetaraj servoj kaj librostandoj. Unuvorte: homo kies vivocelo estis antaŭenigo de la Internacia Lingvo.

Li esperantistiĝis en 1936 kaj aktiviĝis en 1946. De tiu tempo li publikigis aron da naci-kaj Esperantlingvaj artikoloj.

Krom deko da nacilingvaj verkoj, li kompilis "Kroatoserba-Esperanta vortaro", "Esperanta-serbokroata vortaro", "Bibliografio de la internacia lingvo en Jugoslavio", "Bibliografio de beletraj tradukoj de jugoslaviaj verkistoj en la Esperanta gazetararo", "Historio de la Esperanto-movado en Jugoslavio", "Adresaro de jugoslavaj esperantistoj", "Koncizaj biografioj de jugoslaviaj esperantistoj", "Es-

LAŬLUM:



Marinko Gjivoje (1919-1982)

perantonimoj”, “Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj”, “Interesa arkeologio”. Li verkis “Panoramo de Esperanta literaturo”; reverkis kaj esperantigis “Sekretoj de la mar-estajoj” de Petar Giunio; redaktis kaj prologis la manuskriptojn de forpasintaj esperantistoj “Gaspard Marin vizitas sian hejmon — la mondon” kaj “La paperoj de d-ro Ramljak”; kunlaboris por la eldonaĵoj de la Kroatia Esperanto-Ligo “Re-ĉoj” kaj “Honore al ili”. Kune kun d-ro Ivo Borovečki li publikigis la felietonon “Esperanto radniĉki jezik” (Esperanto lingvo laborista).

La lasta verko de Marinko Gjivoje “Leksikono de jugoslaviaj esperantistoj” estas parte kompostita kaj eldonota.

Sian grandan Esperantan bibliotekon kaj dokumentaron Marinko Gjivoje testamentis al speciala fonduso de la Zagreba Universitata Biblioteko.

IMITU LA EKZEMPLON DE M. GJIVOJE POR MULTIGI E-BIBLIOTEKOJN!

La forpaso de Marinko Gjivoje kaj lia malapero el nia movado signifas perdon de diligenta verkisto, lerta redaktoro kaj konsciencia fleganto de la Esperanta kulturo. Por nia gazeto “El Popola Ĉinio” li estis ne nur aktiva peranto kaj kontribuanto, sed ankaŭ iniciatanto de interŝanĝo de esperantaĵoj inter nia redakcio kaj lia riĉa biblioteko, dank’ al kio nia modesta biblioteko ricevis pli ol 200 titolojn. Mi sentas koran funebron pro la perdo de tiu simpatiulo, kun kiu mi havis la feliĉon konatiĝi persone.

Mi konatiĝis persone kun Marinko Gjivoje en 1978, okaze de la 63-a Universala Kongreso en Varna. Nia renkontiĝo inter la 4 500 kongresanoj el 50 landoj ne estis hazardo. Li okupiĝis pri kolekto de informoj pri bibliotekoj publikaj kaj privataj, kiuj havas relative grandan kolekton da esperantaĵoj. Li deziris mian helpon en akiro de informoj pri ĉinaj bibliotekoj. Ne multajn vortojn mi interŝanĝis kun tiu negrasa viro kun alta frunto kaj saĝaj brilaj okuloj, tamen mi ricevis profundan impreson pri lia energio kaj seriozeco.

La aktivado de Marinko Gjivoje memorigis al mi la alvokon de kamarado Eltunko pri fondo de orienta Esperanto-Biblioteko en la kvardekaj jaroj. Bedaŭrinde li martiriĝis, antaŭ ol li povis serioze okupiĝi pri tiu entrepreno. Sed M. Gjivoje sukcesis

fondi sian bibliotekon kun riĉa kolekto de ĉ. 5 500 libroj, 200 jarkolektoj de Esperantaj periodaĵoj kaj ĉ. 1 000 Esperantaj prospektoj, poŝtkartoj ktp, kiujn li testamentis al la Zagreba Universitata Biblioteko. Tio signifas, ke Gjivoje postlasis al la esp-istaro longe utiligeblan frukton de diligenta laboro, almenaŭ por la jugoslavaj samideanoj.

Ja ĉiuj vidas la gravecon de la eldonado de libroj, gazetoj k. s. por la E-movado. Por bone utiligi la esperantaĵojn necesas fondo de Esperantaj bibliotekoj grandaj kaj malgrandaj publikaj kaj privataj, kiuj kolektas, konservas kaj cirkuligas la esperantaĵojn en servado al la legantoj. Fondi kaj prizorgi bibliotekojn ja signifas flegadon de la Esperanta kulturo. En tiu ĉi sfero Marinko Gjivoje donis brilan ekzemplon imitindan por ĉiuj seriozaj esperantistoj kaj Esperantaj organizoj.

Imagu al vi, kiel bone estu, se ekzistus en la mondo miloj da bone funkciigataj Esperantaj bibliotekoj. Tiam la minimuma eldonkvanto de ĉiu leginda libro ne estus la kutimaj 1 000 ekzempleroj, sed 5 000, eĉ 10 000 ekzempleroj! Kiel ekflorus Esperanta eldonado! Ĉu tio ĉi ne estas afero serioze pripensinda? Ĉu ĝi ne estas afero farinda? Ĉu ĝi estas neefektivebla revo? Sukcesoj ja dependas de la klopodoj de ni esperantistoj. Ni imitu la ekzemplon de Marinko Gjivoje kaj strebu por multigi la Esperanto-bibliotekojn!

La 34a kongreso de IFEF

DE la 2-a ĝis la 8-a de majo, ĉijare okazis la 34a kongreso de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio en Balatonfured de Hungario kun 605 partoprenantoj el 22 landoj.

Prezidanto de LKK kaj de la solena inaŭguro Istvan GULYAS detale raportis pri la preparlaboro de la hungaraj fervoĵistoj kaj pri la grandskala helpo de la diversaj hungaraj

instancoj. La vicĝeneraldirektoro Sandor URBAN parolis pri la grava signifo de Esperanto por fervoĵistoj, kiuj ricevas kontinuan apogon pere de la Hungaraj Ŝtatfervoĵoj.

Istvan Gulyas parolas en la 34-a IFEF-Kongreso



Parto de la kongresanoj (la tria de dekstre en la antaŭa vico estas nia peranto s-ro Leopold Patek)



En la nomo de la Hungara Fervoĵista Sindikato Bela SZEMOK, sekretario, salutis la kongreson kaj emfazis, ke la fervoĵistoj posedas eminentan demokratian rimedon, la Esperanto-lingvoscion por la plibonigo de la reciprokaj internaciaj kontaktoj. Vespere la Hungara Televido dissendis longan koloran raporton pri la 34a IFEF-Kongreso.

Dum la plena kunsido de la kongreso prezidanto Giessner voĉlegis ankaŭ salutvortojn de Ĉina Esperanto-Ligo (transdonis s-ano SCHINDLER). S-ro H. SCHINDLER varbcele transdonis EPĈ-ekzemplerojn al la kongreso. La plena kunsido temis interalie pri la venontaj IFEF-kongresoj. La 35a estos en Belgio en 1983, la 36a en Bulgario en 1984, la 37an aranĝos kvar nordaj landoj: Svedio, Norvegio, Finnlando kaj Danio en 1985, la 38a en Jugoslavio en 1986, la 39a en Francio en 1987 kaj la 40a en Hispanio en 1988.

La kongreso estis bonsukcesa pro la profitodonaj terminaraj, historia, fakprelegaj komisionokunsidoj, pro la altnivela fakprelego de s-ro ISTVAN GULYAS, pro la geologia, literatura, scienca prelegoj de invititaj prelegantaj gastoj. S-ro prezidanto J. GIESSNER profunde analizis la diversajn programojn kaj kunsidojn de la kongreso.



ĈINIO DONACOS AL JAPANIO PLIAN PANDON

Por plenumi la deziron de la japana popolo, la ĉina registaro decidis donaci al Japanio plian virpandon.

Kiam la ĉefministro de Ĉinio Zhao Ziyang anoncis dum sia vizito al Japanio la decidon al la japana ĉefministro Suzuki Zenko, tiu ĉi esprimis koran dankon. Li diris, ke la infanoj kaj la popolo de Japanio, kaj ankaŭ la registaro, certe ĝojos pro tio. La japana ministro pri eksteraj aferoj Sakurawuchi Yoshio diris, ke la kuranta jaro estas la centa datreveno de la fondiĝo de la Zoo Wueno, tial estas signifa tio, ke Ĉinio refoje donacos al Japanio pandon.

La ĉina registaro donacis en 1972 al Japanio paron da pandoj, kiuj poste mortis. En 1979 la ĉina registaro donacis al Japanio la pandinon Huanhuan. La japana popolo esperis, ke Ĉinio donacos virpandon.

“PRI LITERATURO, ARTO KAJ KULTURO” DE G. M. DIMITROV ELDONIĜIS EN PEKINO

Por celebri la centan datrevenon de la naskiĝo de la granda gvidanto de la bulgara popolo kaj la elstara revoluciisto de la internacia komunisma movado, la Popola Literatura Eldonejo kaj la Popola Eldonejo de Ĉinio eldonis “Pri Literaturo, Arto kaj Kulturo” de G. M. Dimitrov kaj “La Biografio de G. M. Dimitrov” en la ĉina lingvo.

“Pri Literaturo, Arto kaj Kulturo” enhavas gravajn artikolojn pri literaturo, arto kaj kulturaj laboroj. “La Biografio de G. M. Dimitrov” estis kompilita de la Historia Instituto de la Bulgara Komunisma Partio kaj eldonita en 1978. Ĝi entenas 160 000 ĉinajn ideografiaĵojn kaj estas la plej nova eldono de biogra-

fio de G. M. Dimitrov, el kiu iuj materialoj estas unuafoje publikigitaj.

INTERNACIA INVITA ATLETI- KA KONKURSO OKAZIGITA EN PEKINO

La Pekina Internacia Invita Atletika Konkurso de 1982 okazis de la 18-a ĝis 20-a de junio. La konkurso havis 20 disciplinojn. Pli ol 70 sportistoj el dek landoj partoprenis en la konkurso. Ĉinaj sportistoj gajnis la unuan lokon en kvin disciplinoj, sportistoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Japanio kaj Rumanio tri unuajn lokojn kaj tiuj de Hindio, Trinidado kaj Tobago, Sovetunio la unuan lokon en unu disciplino.

La ĝenerala sekretario de la Internacia Atletika Federacio invitive partoprenis en la konkurso kaj esprimis, ke la ĉinaj sportistoj akiros sukceson en la ĉi-jara azia sportkunveno.

EKSPozICIO DE ĈINAJ FILMOJ EN PARIZO

En la unua tagdeko de junio, la Materiala Centro de Ĉinaj Filmoj en Parizo okazigis unusemajnan ekspozicion de ĉinaj filmoj, en kiu oni projekciis 60 filmojn. La filmoj prezentis la historion de ĉina filmado de 1925 ĝis 1982.

La ĉinaj filmoj kun nacia gusto altiris al si multajn francojn. Inter ili la plej ŝatataj ĉinaj filmoj estas “Strataj Anĝeloj”, “Senfina Ĉagreno”, “La Butiko de la Familio Lin”, “La Ĉefa Historio de A-Q”, “Fratinoj sur Scenejo” kaj “Ĉevalpaŝtisto”. Multaj el la filmoj surhavas dialogan tekston kaj iuj filmoj estis projekciitaj en sinkrona interpretado de junaj ĉinologoj.

ĈINA DELEGACIO DE PORSTU- DENTAJ LABORANTOJ VIZITIS JUGOSLAVION

De la 6-a ĝis 16-a de junio, la delegacio faris al Jugoslavio amikan viziton. Ĝia estro Lin Yanzhi, prezidanto de la Ĉina Studenta Fe-

deracio, diris al ĵurnalisto: “Dum la vizito ni estis varme akceptitaj de jugoslavaj junuloj. Ili malkaŝema, sincera kaj amika sinteno profunde impresis nin.”

GUANGDONG-OPERA TRUPO VIZITIS NORDAN AMERIKON


La Guangdong-opera Trupo de Ĉinio flugis al Kanado kaj Usono la dekan de junio kaj faris dumonatan turneon. La famaj aktorinoj Hong Xiannü kaj Chen Xiaofeng estas ĝiaj ĉefaj roluloj. Guangdong-opero kun longa historio estas unu el la ĉefaj operoj de suda Ĉinio kaj ŝatata de la popolanoj de Guangdong, Guangxi, Hongkong kaj Aomen.

“PENTRAĴOJ DE WU ZUOREN KAJ XIAO SHUFANG” ELDONI- ĜOS EN BRITIO

Je la 9-a de junio, en Londono, la fama ĉina pentristo Wu Zuoren ĉeestis la akceptan kunsidon okazigitan de la eldona kompanio Maxwell por rekomendi la “Pentraĵojn de Wu Zuoren kaj Xiao Shufang”. Tiu granda albumo estos distribuata de la kompanio en Britio. Ĝi enhavas 48 pentraĵojn, inter kiuj plejparto estas iliaj ĉinstilaj pentraĵoj en la pasintaj jaroj. Inter ili nemalmultaj estas konservataj de ĉinaj kaj alilandaj muzeoj, artaj galerioj kaj kolektistoj aŭ eksponataj, kaj alia parto aperos unuafoje antaŭ la legantoj.

EKSPozICIO DE ĈINAJ BRODA- ĴOJ EN ATENO

La 25-an de junio finiĝis la 15-taga ekspozicio de ĉinaj brodaĵoj en Ateno. Ĉirkaŭ kvin mil homoj rigardis la ekspozicion. Ĝi eksponis 70 seriojn da brodaĵoj, kiuj estis elstaraj verkoj faritaj de ĉinaj brodistoj en la tempo de 1964 ĝis 1979. Inter ili troviĝis Suzhou-stilaj brodaĵoj “Peonioj”, “Kaktoj” (duflanka bildo), Hunan-stilaj brodaĵoj “Fazano kaj Ĉina Rozo”, Sichuan-stila brodaĵo “Karmo kaj Lotusfloro”, broditaj mjaŭ-naciaj vestoj kaj lanfadenaj brodaĵoj.



Vizito al la monto Guifeng

de YANGHAI

LA monto Guifeng, kiu situas en la nordoriento de la ĉina provinco Jiangxi, estas dek du kilometrojn fore de la guberni-urbo Yiyang, kaj preterpasata de la Zhejiang-Jiangxi-fervojo. Ĝi havas multajn montpintojn kun groteskaj rokoj kaj ĉielskra-paj arboj.

Pri la monto Guifeng ekzistas multe da belaj legendoj. Laŭ popolrakonto, antaŭ tre tre longe tie estis la palaco de la Orienta Drakoreĝo. La Okcidenta Drakoreĝo, frekventante lin, ekenviis la belan kaj ĉarman palacon kaj intencis okupi ĝin. Foje la Okcidenta kaj Orienta Drakoreĝoj ludis ŝakon post drinkado. Antaŭ la ludo la Okcidenta Drakoreĝo proponis veton je la respektiva palaco. Pro ebrietigo la Orienta Drakoreĝo konsentis. La veton gajnis la Okcidenta Drakoreĝo kaj tiu postulis la vetojn. La Orienta Drakoreĝo konsciis, ke li estas trafita de la artifaĵo de la Okcidenta Drakoreĝo. Neniu el ili volis cedi, kaj pro tio inter ili estiĝis intensa batalado. La Okcidenta Drakoreĝo, pli ruza ol la Orienta, la unua akuzis al la Ĉiela Reĝo Yuhuang kaj kredigis tiun je la afero. La Ĉiela Reĝo sendis ĉielajn trupojn por helpi la Okcidentan Drakoreĝon batali kontraŭ la Orienta. Vidinte la malfavorecon la Orienta Drakoreĝo elĉerpis la akvon de la palaco per unu tiro kaj tuj flugis for. De tiam la palaco de la Orienta Drakoreĝo montriĝis al la homa mondo kaj fariĝis pitoreska pejzaĝo. La ĉefa montpinto

forme similas al testudo, pro kio ĝi estas nomata la Testuda Montpinto. La montpinto, kiu staras ĉe montpasejo, forme similas al tia jadplato, kian tenis imperiestroj aŭ reĝoj en la mano okaze de ceremonio, pro kio ĝi estas nomata la Jadplata Montpinto (Guifeng).

La monto Guifeng konsistas el 36 montpintoj kaj ok plej vidindaj lokoj, inter kiuj troviĝas la Natura Triopo, Maljunula Pinto, Silenta Fonto, Eĥa Valo kaj Strio da Ĉielo.

Sube de la monto Zhanqifeng oni konstruis tunelon pli ol 100 metrojn longan kaj pli ol 30 metrojn larĝan. Servante kiel portalo al la pitoreskejo, la tunelo estas aparte majesta kaj impona. Trapasinte la galerion oni venas en alian pejzaĝon. Levante la kapon oni vidas montpintojn similajn al bambuĝermoj aŭ kolonoj formitaj per la mistera lerteco de la naturo. Centojn da paŝoj pli antaŭe, pado ombrata de bambuaroj kondukas al la kiosko Fengyu, staranta ĉe la talio de la monto. Laŭ legendo, la kioskon konstruigis la Orienta Drakoreĝo por sia filino. La princino prenis la lokon kiel tualetejon kaj belvidejon. Apud la kiosko estas la Silenta Fonto, kiu senĉese elfluas el rokfendo en la monttalio. La klara akvo estas tre dolĉa enhavante multajn mineralojn. Irante pli supren, oni vidas danĝeran rokmuron, sur kiu kuŝas tri gigantaj ŝtonoj unu sur alia. Ili havas la formon de testudoj levantaj la

kapon al la nordo. Oni diris, ke en tiu jaro, kiam la ĉielaj trupoj atakis la palacon de la Orienta Drakoreĝo, testudino kaŝis siajn tri idojn en kavernon kaj jetis sin en la batalon. Poste ŝi mortis en la batalo. La testudidoj sopirantaj al sia patrino rampis unu post alia sur altegan montpinton kaj levis sian kapon por provi vidi la revenon de la patrino. Pro tio oni nomis la montpinton Natura Triopo. La tri gigantaj ŝtonoj alte staras en nuboj, kaj turistoj starantaj sub la ŝtonoj vidas nur nubojn ruliĝantajn ĉirkaŭ ili kaj sentas prematecon pro la gigantaj ŝtonoj. Maldekstre de la Natura Triopo krute staras rokmuro fendita en du partojn, kvazaŭ paro da glavoj ili pikas la ĉielon. Tra la fendo oni vidas strion da ĉielo.

De la Strio da Ĉielo oni piediras pli ol dudek paŝojn laŭ zigzaga vojeto por atingi la malantaŭon de la monto. Tie estas alia aspekto. La rokvejoj estas kvazaŭ desegnitaj per peniko, kaj tiel oni nomis ĝin Freska Montpinto. Oriente de ĝi estas la mirinda Eĥa Valo. Se turistoj ĉi tie faras tiratan krion, eĥo venas de tri direktoj. Se iri pli antaŭen, la zigzaga vojeto kondukas malsupren al la Sanatorio Guifeng. Tie estas centjara osmantarbo, sub kiu estas ŝtonaj tabloj kaj benketoj por ŝakludo. Tie oni povas ĝui la pejzaĝon ĉe la Maljunula Pinto, granda roko vizaĝe al verdaj bambuaroj kaj dorso al


(Daŭrigota sur p. 39)



Guifeng-monto

Fotoj de YANG JISHOU kaj CAI HAIFENG

Groteskaj rokoj




La montpinto Maljunulo

La trapasejo
Strio da Cielo


Guifeng-monto rigar-
data de malproksime





En matena krepusko

Verda bambuaro



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Foto de B. L. HASWELL (Britio)




Miaj infanoj, kiuj ŝatas foliumi
la revuon EPC por trovi pagodon



LOTUŜ-BLANKA

KRABAĴO



Ĉinaj pladoj



SHI SIWEI:

Esperantisto kaj pentristo Shen Roujian



Shen Roujian en pentrado

S-RO Shen estas fama ĉina pentristo kaj ankaŭ entuziasma subtenanto de la Esperanto-movado.

Li naskiĝis en 1919. Jam en sia infaneco li eklernis pentri. La diverspozaj lignaj kaj argilaj budhostatuoj en temploj de lia

hejmloko faris sur li neforgeseblan impreson. Kiam li lernis en mezlernejo, li komencis studi Esperanton kaj legis la libron "La Vivo de Zamenhof", kiu profunde kortuŝis la junulon. Li ofte kantis kune kun siaj amikoj la Esperantan kanton "Sub la Verda Stelstandardo".

En la tridekaj jaroj, kiam Ĉinion minacis nacipeco pro la agreso de Japanio, li servis en la Nova Kvara Armeo, unu el la kontraŭjapanaj armitaj fortoj de Ĉinio. Tiam li ĉiam kunportis kun si en la dorsosako notkajeron, krajonon kaj grifelon por verki en militpaŭzoj. En gazetoj

Lotus-blanka krabaĵo

Materialoj:

Grandaj riverkraboj	24
Ovoblanko	de 10 ovoj
Arakidoleo	600 g. (50 g. estos forkonsumitaj)
Kokaja supo (sen viando)	250 g.
Faruno	15 g.
Trapa amelo (aŭ alispeca amelo)	10 g.
Haketitaj cepoj kaj zingibro	15 g.
Vino	10 g.

Salo	5 g.
Lardo	50 g.
Blanka sukero kaj pipra pulvoro	5 g.

Preparado:

1. Ligu la lavitajn riverkrabojn per fadeno kaj metu ilin en kuirilon por bone vaporumi. Elprenu la kuiritajn krabojn kaj deprenu ties viandon por la baldaŭa uzo. (Kon-servu la krabajn ŝelojn.)

2. Metu la lardon en la varmigatan kaserolon kaj iom fritu la

haketitajn cepojn kaj zingibron. Verŝu en ĝin la preparitan krabaĵon kaj kirle fritu. Aldonu la vinon, kokajan supon, salon, sukeron kaj pipran pulvoron, kaj stufu milde 15 minutojn. Kiam la supo elĉerpiĝas, plenigu la krabajn ŝelojn per la kraba miksaĵo.

3. Batu la ovoblankon ĝis ŝaŭmado kaj miksu ĝin kun la faruno kaj amelo. Sternu la miksaĵon sur ĉiun el la krabaj ŝeloj. Bone fritu la farĉitajn krabŝelojn en modere varma oleo, post kio la plado estos preta.

kaj ĵurnaloj de la kontraŭjapana bazloko ofte publikiĝis liaj lignaj gravuraĵoj nigraj-blankaj, kiuj saturitaj de patoso forte kuraĝigis la armeanojn en ilia justa batalo. La eksterordinara batalvivo kutimigis lin kapti ĉiun liberan minuton por verki. Eĉ nun li restas ankoraŭ diligenta kaj ĉiujare kreas pli ol cent pentraĵojn.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio Shen Roujian forlasis la armeon por profesie sin okupi pri pentrado. En la pasintaj pli ol tridek jaroj li restigis siajn piedsignojn ĉie tra la tuta Ĉinio.

La verkoj de Shen plenas de forta vivetoso. Lia kolora lignogravuraĵo "Bela Tero" sentigas malsamajn gustojn pro delikata gravurado. En ĝi videblas kaj ornama stilo de la ĉinaj popolaĵ pentraĵoj kaj esprimmaniero de impresionismo. Lia alia kolora lignogravuraĵo "Post Neĝado" bildigas grandan urbon en kvieta postneĝa nokto. Tiu lia verko konserviĝas ekde 1981 en la Pariza Ŝtata Biblioteko de Francio.

S-ro Shen dufoje veturis al Eŭropo por pentrado. En 1960 li vizitis la naskiĝlokon de la granda germana poeto Goeto. Forte kortuŝite de la diligenteco de la poeto, li faris koloran lignogravuraĵon "La Naskiĝloko de Goeto". Dum la vojaĝo li verkis ankaŭ "Malnovaj Domoj de Naumburgo" kaj "Mateno en Prago", kiuj estas multe ŝatataj de eksterlandaj amikoj.

Li estas ne nur fama lignogravuristo sed ankaŭ lertulo en olepentrado, ĉina tuĉodesegnado kaj kaligrafio. Li pledas por kombino de la ĉina kaj okcidenta pentrado kaj formis sian propran artan stilon. En la lastaj jaroj li kreis ĉefe ĉinstilajn pentraĵojn. La enhavoj de liaj pen-



La familio de Shen Roujian

traĵoj estas vastaj, la stilo freŝa, la uzo de koloro kaj inko harmonia. Lia ĉinstila pentraĵo "En Ananasa Kultivejo" estis elektita de la Ĉina Belartista Asocio por esti eksponata en Salono de la printempo 1982. Krom pentrado li studas ankaŭ estetikon. En decembro 1981 li akceptis iun italan verkiston. Dum la mallonga kunestado la gasto tre admiris lian riĉan scion kaj originalan opinion pri la orienta kaj okcidenta artoj. La Itala Disaŭdiga kaj Televida Kompanio faris televidan filmon kun la titolo "La Ĉina Pentristo Shen Roujian".

Ankaŭ Wang Mulan, la edzino de Shen, estas esperantistino. Ĉe ili ofte gastas amikoj-samideanoj. Informiĝinte, ke Wang Mulan estas esperantistino, iu veterana esperantisto, kiu lernis Esperanton en la tridekaj jaroj, donacis al ŝi siajn Esperantajn librojn, gazetojn kaj vortarojn. Wang nun instruas en iu alta lernejo en Ŝanhajo kaj estas membro de la Prepara Grupo de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Sub ŝia propono tiu lernejo fun-

kciigis Esperanto-kurson en la pasinta jaro. Kiam la Delegacio de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko vizitis Ŝanhajon en 1981, ŝi donacis al la usonaj gastoj koloran lignogravuraĵon "Vilaĝo" verkitan de ŝia edzo. Ŝia amikeco multe kortuŝis s-ro William Harmon, la prezidanton de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. Ilia filo Shen Gang laboras en belarta sekcio de Jiaotong-universitato en Ŝanhajo kaj ilia filino Shen Li estas esplor-studentino pri la modernaj literaturoj de Britio kaj Usono de la Orientĉinia Instruista Universitato de Ŝanhajo. Ankaŭ ŝi estas amatoro de belarto, kaj oni ofte povas trovi en gazetoj ŝiajn tradukaĵojn de disertaĵoj pri belarto. La familio vivas tre feliĉe kaj harmonie. La geedzoj kaj filino ofte kolektiĝas en lia laborĉambro kaj kune diskutas pri pentrado kaj estetiko.

Shen Roujian multfoje diris: "Pentrado ne povas disiĝi de la epoko nek de la nacia grundo." Tion montris ĝuste la vivo kaj verkado de la pentristo mem.

Mirakla Kuracado

—Pri la blinda masaĝisto Cong Linsheng

S-ro Dudas Zoltan, nia jugoslava leganto kaj studento de la Filozofia Fakultato en Novi Sad, skribis al nia redakcio: "Mi estas 22-jara kripla knabo. . . Mia vivo estas tre malfacila. Mi scias, ke mi ne estas sola. Multaj homoj vivas en la mondo, kies sorto estas simila al la mia." "Mi ŝatus scii, kiel vivas miaj malsanaj kamaradoj aliloke. . ." Por kontentigi lin ni publikigas la jenan artikolon. Cetere, la artikolo de Gao Shiqi, verkisto de populara scienco, en la nuna numero ja rakontas pri kriplulo. Ni esperas, ke tiuj artikoloj helpas s-ron Dudas Zoltan kaj aliajn legantojn koni la ĉinajn kriplulojn. Ni kore deziras al s-ro Dudas Zoltan bonajn sukcesojn en la lernado kaj feliĉon en la vivo.

La Red.

Kiam mi la unuan fojon informiĝis pri la kuracejo, en kiu laboras blinduloj, scivolemo pelis min veni tien por rigardi.

Ĝi, situanta ĉe iu mallarĝa strateto, nomiĝas la Masaĝejo de la Okcidenta Distrikto de Pekino. Ĝia antaŭa nomo estis Masaĝejo de Blinduloj. Tio estis ĉar la kuracejo estis funkciigita de sep blinduloj antaŭ pli ol 20 jaroj. Malgraŭ sia malgrandeco ĝi ĝuas altan prestiĝon inter la malsanuloj. Post masaĝado en la kuracejo mirakle resaniĝis malsanuloj, kiujn kuraci rifuzis la grandaj hospitaloj kun preteksto ke la malsano estis "ne inda por esti kuracata" aŭ la "nekuracebla malsano ne bezonis kuraci plu". Tial ĝia famo estis diskonigita ĉe la publiko. Ĉiutage antaŭ la kuracejo kolektiĝas amaso da malsanuloj atendantaj kuracadon. La kuracejo ĉiutage akceptas 500 malsanulojn, inter kiuj estas laboristoj, kamparanoj, dancistoj kaj sportistoj kaj de Pekino kaj de aliaj lokoj de Ĉinio.

Plejparto de la tieaj blinduloj-

masaĝistoj trapasis zigzagan vojon kaj havas kortuŝan historion. La 52-jara masaĝisto Cong Linsheng estas multe laŭdata de ĉiuj malsanuloj pro sia masaĝarto kaj servemo.

Iu pli-ol-50-jara virino sentis premon ĉe sia brusto transportinte pezan objekton. Ekzameninte, kelkaj grandaj hospitaloj senescepte suspektis, ke ŝi suferas de kor-malsano. Post kelkmonata kuracado per medikamento kaj injekto ŝi estis nesaniĝita. Cong palpis ŝiajn vertebrojn kaj rimarkis, ke ŝin doloras premo al la sepa toraka vertebro. Pli detale esplorinte, li fine trovis, ke la doloron kaŭzis elartikiĝo de la sepa toraka vertebro. Masaĝinte dek-kelkajn minutojn Cong movis la elartikiĝintan vertebron sur la originan lokon, post kio tuj malaperis la doloro.

Cong estas lerta en kuracado de mislokiĝo de lumba intervertebra disko, de kiu suferas multaj malsanuloj. Mi informiĝis de iu paciento, ke la malsano ofte kaŭzis al li akran doloron,

tiel ke li povis neniom sin movi. Dum pli ol unu jaro li vizitis multajn kuracistojn, sed la sufero ne nur ne kvietiĝis, sed male, akriĝis tagon post tago. Fine li venis al masaĝisto Cong kaj post kvar-monata kuracado li preskaŭ tute resaniĝis. Promenante en la ĉambro, li kun neretenebla ĝojo diris al mi: "Baldaŭ mi ree laboros. Mi kore dankas doktoron Cong."

Masaĝisto Cong estas modesta. Dum interparolo kun mi li tre malmulte parolis pri si mem, sed pacience klarigis al mi la teorion pri masaĝo.

Masaĝo, trezora heredaĵo de la ĉina medicino kaj simpla kaj efika kuracarto, estas formita kaj disvolvata dum miloj da jaroj en la kuracado de malsanoj fare de ĉinoj. Per manoj, piedoj kaj aparatoj la kuracisto knedas, premas, frotas kaj pinĉas la difinitajn korp-partojn de malsanulo por vigligi la cirkuladon de sango kaj vivaj energioj, glatigi la moviĝon de la artikoloj, reguligi la funkcion de la nerva sistemo kaj plivigligi la endokri-

najn glandojn. Krom masaĝo iuj malsanuloj ankoraŭ devas preni medikamenton kiel helpan kuracrimedon. Hodiaŭ masaĝ-fako troviĝas en multaj grandaj hospitaloj de Ĉinio.

Iuj diris al mi, ke la blindulo-masaĝisto pli efike masaĝas, kion kaŭzas la kompensa funkcio. Alivorte, kiam la okuloj perdis vidkapablon, iliajn funkciojn anstataŭas aliaj organoj, ekz. la tuŝ-senso fariĝas pli akra ol ĉe la ordinara homoj. Tial la blinduloj povas pli facile trovi la kaŭzon de malsano. Kompreneble estas aparte gravaj por la blindulo-masaĝisto la malcedema volo kaj firma spirito servi al la malsanuloj.

En 1951 Cong Linsheng, 23-jara medicinisto-soldato, en batalo estis trafita de malbeninda bombsplitaĵo en la okuloj kaj perdis la vidkapablon. En ekstrema malĝojo kaj malespero li eĉ volis fini sian vivon. Poste oni sendis lin en la Sanatorion por Kriplaj Armeanoj. Tie li vivis tre komfortan vivon. Venis al li lia fianĉino. Post la geedziĝo lin karesis la familia ĝojo kaj lin bone zorgis la virta edzino. Li ja povus trapasi sian vivon en tiaj komfortaj cirkonstancoj, sed li soifis je laboro por servi al la popolo. Li estis sendita en la masaĝan kurson por blindul-kuracistoj okazigitan en Pekino de la Ĉina Asocio de Blinduloj kaj Surdamutuloj. De tiam Cong komencis sian novan vivon.

Lerni masaĝon estas malfacile por blindulo, ĉar li ne povas rigardi bildon nek modelon. Post ĉiu leciono Cong algluis pece-tojn de glubendo al difinitaj partoj de sia korpo laŭ la indiko de la instruisto kaj foje refoje palpis ilin por bone memori iliajn



Blinda masaĝisto Cong Linsheng

nomojn. Por bone posedi la masaĝarton li eklernis brajlon. Dank' al sia neŝancebla persistemo li ellernis la masaĝon. En 1958 li estis sendita en tiun ĉi kuracejon, diplomitiĝinte el la kurso per eminentaj notoj.

En la daŭro de 24 jaroj li kuracis minimume cent milojn da pacientoj. Li propramane senigis doloron de sennombraj malsanuloj, per kio tagon post tago perfektigis lia masaĝarto. Li ne nur bone kuracas la kirurgiajn malsanojn kaŭzitajn de traŭmato, sed ankaŭ havas riĉajn spertojn en kuracado de internaj malsanoj, kiel kolecista kalkuluso, gastroptozo, stomaka ulcero, infana dispepsio k.a.

Laŭ regulo ĉiu kuracisto devas masaĝi dek ses pacientojn ĉiutage, sed Cong traktas tridek pacientojn ĉiutage, inter kiuj plejparto estas gravaj malsanuloj, kiuj kuŝas en hospitalo. Ĉiutage, kiam komenciĝas la laboro, li masaĝas la malsanulojn senhalte ĝis tagmanĝo, kaj laboras sammaniere en la post-

tagmezo. Li estis nomumita vicestro de la masaĝejo kaj ekhavis pli multe da zorgoj. Malgraŭ tio, ke posttagmeze li devas ofte ĉeesti kunvenon aŭ fari aliajn publikajn aferojn, li ne mallongigas la kurac-tempon por la malsanuloj. Li ofte masaĝas frumatene kaj vespere. Masaĝo bezonas multe da forto. Pacientoj sentas maltrankviliĝon, vidante lian vizaĝon plenan de ŝvito, sed Cong diras: "Mi estas ĝoja malgraŭ laciĝo, se nur mi povas kvietigi la doloron de la malsanuloj."

Cong ne akceptas rekompencan de la pacientoj nek ĉasas pli bonajn vivkondiĉojn. Lia monata salajro estas malpli ol okdek juanoj. Ĉiufoje, kiam iu alia rimarkigas, ke lia enspezo estas malgranda, li ja diras, ke tio jam sufiĉas kaj ke li strebas nur al servo al pli multe da malsanuloj.

Nia interparolo iris ne longe, kaj li stariĝis kaj petis mian pardonon, dirante ke lin atendas multe da pacientoj.

Nerompebla Vejĉi-ludo

—Pri la kolora rakonta filmo

“La Nefinita Vejĉi-ludo”

TIU filmo estis farita lastatempe de ĉinaj kaj japanaj filmistoj, kaj oni ĝin projekcios en ambaŭ landoj je la 10-a datreveno de la publikiĝo de la komuna deklaro pri la stariĝo de diplomaciaj rilatoj de Ĉinio kaj Japanio en septembro ĉi-jare.

La filmo prenis la longan periodon de la 20-aj ĝis la 50-aj jaroj kiel sian fonon. Ĝi rakontas, ke du vejĉi-istoj de Ĉinio kaj Japanio kaj iliaj familianoj tragedie disiĝis kaj poste ĝoje rekuniĝis. Per tio la filmo severe malkaŝas, kiajn katastrofojn alportis al la homaro la agresiva milito kondukita de la japanaj militaristoj, kaj prikantas la longdaŭran kaj neestingeblan amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj.

La ĉina vejĉi-isto Kuang Yishan, la reĝo de vejĉi-o en la suda Ĉinio, havis japanan amikon Matsunami Rinsaku kiel sian elstaran kunludiston. En 1924, admirante unu la alian ili faris ludadon en Pekino. Sed, la ludo ankoraŭ ne estis finita, kiam Kuang estis arestita de militista instanco. Poste s-ro Matsunami savis lin el la malliberejo helpate de sia amiko, tamen venis la dato por li reiri al Japanio, pro kio ili ne povis fini

la ludon. Antaŭ la forlaso s-ro Matsunami sincere petis s-ron Kuang sendi sian filon Kuang Aming, kiu lerte ludis vejĉi-on, al Japanio por kulturi la lastan en vejĉi-stelulon. Post ses jaroj Aming venis al Japanio, kunportante ventumilon kun la surskribo “Brave Flugulo”, kiun donacis al li la patro por kuraĝigi lin multe kontribui en estonta prosperigo de la ĉina vejĉi-o. En Japanio li ĉiam gravuris en sia memoro la konsilon de la patro kaj multe progresis en la vejĉi-arto sub la gvido de s-ro Matsunami.

En julio 1937 eksplodis la Incidento en Lugouqiao. La japana armeo komencis grandskalan agreson al Ĉinio. Ĉagrenite de la sorto de la patrujo Aming estis preta reveni al Ĉinio. Lia fianĉino Tomoe, la filino de s-ro Matsunami Rinsaku, admonis lin resti en Japanio. Poste li okupis la Sanktan Lokon de la Japana Vejĉi-instituto, sed la japanaj militaj instancoj devigis lin ŝanĝi sian naciecon. Li preferis forlasi la Sanktan Lokon kaj la instituton, ol ŝanĝi la naciecon. Por eviti persekutadon li kaj lia edzino Tomoe decidis fuĝi al Ĉinio. Trompate de iu gvidanto de la dekstruloj, s-ro Matsunami konsentis, ke tiu

helpu Aming al Ĉinio. Sed ĝuste pro tio Aming estis murdita survoje al la patrujo. Tomoe ek-suferis de mensa malsano. Ne-longe poste s-ro Matsunami estis rekrutita al Ĉinio, kaj poste servis en la urbo Wuxi, la hejmloko de Kuang Yishan.


En tiu tempo Kuang Yishan estis trafita de granda malfeliĉo. Ĉar li ne volis ludi kun japana oficiro Ozaki, li forlasis la urbon kune kun siaj edzino Wanyi kaj filino Ahui. Sur la vojo la edzino kaj filino estis pafmortigitaj de la japana armeo, kaj li mem estis kaptita de Ozaki. Ĉi tiu minacis lin per rompo de fingroj por devigi lin ludi vejĉi-on. Sed Kuang rifuzis tion fari kaj mem rompis siajn du fingrojn. Vidante tion, s-ro Matsunami falis en grandan malĝojon.

En 1945 finiĝis la milito, Kuang veturis al Japanio por serĉi sian filon. Informiĝinte, ke Aming estis murdita, li suspektis, ke tio kaŭziĝis de la perfido de Matsunami. Kuang do ĉie serĉadis lin por venĝi. Tamen li ne trovis lin kaj fine revenis al Ĉinio malespere.

Forpasis pliaj dek jaroj. En 1956, la sepa jaro post la fondiĝo de la nova Ĉinio, s-ro Matsunami vizitis Ĉinion kiel membro de japana vizitgrupo de vejĉi-istoj. Por trovi Kuang venis al Ĉinio ankaŭ lia fratino kaj la filino de Aming. S-ro Matsunami, kun granda malĝojo, transdonis al Kuang la cindron de la geedzoj Aming kaj la ventumilon ruĝigitan de la sango de Aming. Li rakontis la malfeliĉajn travivaĵojn al sia intima ĉina amiko. Tiel malaperis la miskompreno kaj restariĝis la amikeco inter Kuang Yishan kaj Matsunami Rinsaku. Kvankam ili ambaŭ jam aĝas pli ol 60 jarojn, tamen ili anko-



Aming sciigas al Matsunami, ke li kaj lia edzino decidis fuĝi al Ĉinio.



Matsunami transdonis al Kuang Yishan la cindron kaj la objektojn de la geedzoj Aming.

raŭ kun granda vigleco daŭrigis sian ludon rompitan antaŭ 32 jaroj.

La scenaro de la filmo estis verkita de du neprofesiaj verkistoj Li Hongzhou kaj Ge Kangtong. Nelonge post la publikigo de la scenaro fama ĉina aktoro Zhao Dan vizitis Japanion kaj iniciatis faradon de la filmo. Lia propono estis tuj aprobita de japanaj amikoj. Poste, kelkaj japanaj dramistoj ripete reviziis ĝin kune kun la aŭtoroj, kaj fama ĉina scenaristo Xia Yan ĝin poluris. En januaro ĉi-jare la scenaro estis fine perfektigita, kaj ĝin kune ekfilmis la Pekina Film-Studio kaj la Akcia Kompanio Toko-Tokuma.

Por bone kunfari sian unuan komunan rakontan filmon Ĉinio kaj Japanio sendis plej bonajn aktorojn kaj filmistojn. La fama japana reĝisoro Sato Junya kaj la ĉina reĝisoro Duan Jishun kune plenumis la reĝisoradon. S-ro Sato Junya reĝisoris 34 filmojn dum 19 jaroj kaj havas sian propran stilon en arto. La fama ĉina aktoro Sun Daolin laboris kiel la arta konsilisto de la ĉina flanko kaj ludis la ĉefro-

lon de Kuang Yishan. Lia filma kariero jam kovris pli ol 30 jarojn, kaj li tial havas riĉan sperton en prezentado. La fama japana aktoro Mikuni Rentaro ludis la rolon de Matsunami. La invitita aktorino Huang Zongying, la edzino de Zhao Dan, ludis la rolon de Wanyi, la edzino de Kuang. Ŝi estas fama ĉina aktorino kaj verkistino. Fama japana aktorino Mita Yosiko ludis la rolon de la fratino de Matsunami. Du Peng, fama aktoro de la Pekina Junula Arta Teatro, ludis la rolon de Guan Xiaozhou, intima amiko de Kuang. La roloj de Kuang Aming kaj lia edzino Kuang Ba (t.e. Tomoe — Trad.) estis ludataj respektive de la juna ĉina aktoro Shen Guanchu kaj japana aktorino Konno Misako. La rolo de la filino de Kuang Aming estis ludata de la 15-jara aktorino Ito Tsukasa, unu el la nunaj plej famaj dek kantistoj de Japanio. Krome, iujn neĉefajn rolojn en la filmo ludis ankaŭ spertaj aktoroj. Ekzemple, en ĝi ludis la ĉina aktoro Zhang Yan, kiu estis premiita pro la plej bona ĉefrolulo de


Ĉinio en 1981 kaj japana aktorino Matsuzaka Keiko, kiu ludis rolojn en multaj filmoj kaj televidaj dramoj.

La ĉinaj kaj japanaj filmistoj kvar monatojn filmis en la urboj Tokio, Jokohamo kaj Kamakura en Japanio, kaj en la urboj Pekino, Ŝanhajo, Wuxi kaj Suzhou en Ĉinio, ĉu en frostaj tagoj, ĉu en varmaj tagoj.

Por bone plenumi sian rolon en la filmo Sun Daolin elspozis pli ol unu jaron por studi la scenaron, koni la rolon, legi historiajn materialojn kaj lerni vejĉiludon. La filmo enhavis tian scenon: Sur la "nigra bazaro" en Tokio Kuang Yishan suferis atakon de apaĉo per bastono. Li jen ĉirkaŭprenas sian kapon per ambaŭ manoj, jen falas teren, ŝirmante sian ventron kontraŭ bastonado. Kvankam la aktoro Sun jam superis 50 jarojn, tamen li foje-refoje sin ekzercadis en tiuj movoj. La japana reĝisoro demandis lin, ĉu li estas vundita, li tamen respondis: "Ne gravas. Por sperti la vivon kaj perfektigi sian arton, la aktoroj de-



Filmado en Ĉinio



Ĉinaj kaj japanaj filmistoj

vas elteni ĉiajn amarajn pro-
vojn.”

S-ro Mikuni Rentaro estas 59-
jara. Dum la militaj jaroj li ser-
vis kiel soldato en Ĉinio kaj pro-
praokule vidis, ke la agresa mili-
to farita de la japanaj militaris-
toj alportis terurajn katastrofojn
al la popoloj de Ĉinio kaj Japa-
nio. Li opinias, ke la paco estas
tre bona heredaĵo en la historio,
kaj oni devas tutforte batali
kontraŭ la pacominacantoj. La
partopreno en la filmado estas
lia plej granda honoro dum la
tuta vivo. Tial li serioze kaj
penege plenumis sian laboron.
En la urbo Wuxi oni filmadis la
scenon, en kiu s-ro Matsunami
triafoje renkontas Kuang Yishan
tenante la cindron de Aming kun
kulpa konscienco. En la scenaro
estas skribita, ke kiam la du sin-
joroj renkontiĝas, s-ro Matsuna-
mi profunde sin klinas por espri-

mi sian penton. Sed s-ro Mikuni
opiniis, ke tio ne povas plene
esprimi la pentosenton, tial li
proponis, ke por tio s-ro Matsu-
nami devas sin jeti sur la ge-
nuojn antaŭ Kuang, kaj la reĝi-
soro aprobis tiun opinion. Dum
la filmado li, ludanta la rolon de
Matsunami, estis plena je mal-
ĝojo kaj larmoj kaj genuis sur
cementa planko kelkajn horojn.
La ĉinaj aktoroj vidis tion kaj
petis lin stariĝi, sed li jam
eniris en sian rolon. Ĉe tio la-
boranto povis nur meti matracon
sub liajn genuojn, kaj la ĉina
helpreĝisoro Liu Shuan kortuŝi-
ĝis ĝis larmoj.

S-ro Sato neniam paradis per
sia fama reĝisoreco, tre respek-
tis la geaktorojn kaj kredis je ilia
kreopovo. La juna aktoro Shen
Guanchu ludis malmulte en la
pasinteco kaj mankis al li sperto
en prezentado. S-ro Sato do pa-

cience helpis lin analizi la scena-
ron kaj kuraĝigis lin bone ludi,
tiel ke Shen bone plenumis sian
taskon.

La filmo montras, ke la kul-
tura kunlaboro inter Ĉinio kaj
Japanio prezentas vastajn per-
spektivojn kaj la amikeco de la
du popoloj havas profundan
bazon. Ĝi vekas konsciencan ĉe
la popoloj de ambaŭ landoj, ke
ili daŭrigu la amikecon genera-
cion post generacio. Ĝuste kiel
Wang Yang, la direktoro de la
Pekina Film-Studio, diris: “Ni
esperas, ke la filmon ‘La Nefini-
ta Vejĉi-ludo’ kiel eble plej frue
vidu la publiko. Sed se ni pre-
nas la amikajn kontaktojn, la
ekonomian kaj kulturan inter-
ŝanĝojn inter la du popoloj, por
la ‘nefinita vejĉi-ludo’, ĝi estos
nerompebla kaj daŭros por
ĉiam.”

(Daŭrigo de p. 49)

tas pri “ekskludi” kaj “ekskluzivi”.
Mi konstante legas la vorton “dis-
kriminacio” sed konstatas, ke mi
pensas “diskriminado”, kvazaŭ ek-
zistus verbo “diskrimini”.

Mi ne konsentas pri la enkonduko
de la tiel nomata internacia vorto
“dumping”, ĉar ĝi ne konformas al
la Esperanta sistemo. Plibone es-
tus enkonduki la radikon “dump”,
el kiu ni povus derivi la vortojn

“dumpi” kaj “dumpado”, kaj mi
preferus plivastigi la signifon de
“kolokvo” ol oficialigi la radikon
“miting”.

K. G. LINTON
(Aŭstralio)

SOOSEKI NACUME*:

La kakemono

(Novelo)

AVO Dajtoo decidis starigi toamboŝtonon por sia mortinta edzino antaŭ la dua datreveno de ŝia morto. Sed, dum li ne povis ŝpari eĉ unu enon, apenaŭ vivtenante sin per la malgranda enspezo de sia filo, jam duafoje venis novjaro. "Estis la 8-a de marto, kiam via patrino mortis," plende li diris al la filo, sed tiu ĉi nur indiferece respondis: "Ho! Ĉu estis tiel?" Do, la maljunulo decidis forvendi sian trezore konservatan kakemonon, kiun li heredis de siaj prapatroj, por akiri monon por la toamboŝtono. Li konsiliĝis kun sia filo, kaj tiu ĉi konsentis tiel senĝene, ke li sentis iom da malkontenteco pro tio. La filo servas kiel oficisto en la buroo pri religio sub la Ministerio pri Enlandaj Aferoj kaj ricevas monatan salajron de kvardek enoj. Estas ja penige por li vivteni siajn edzinon kaj du filojn, kaj ankaŭ sian patron. Se li ne ha-

vus la patron, la trezoro estus antaŭlonge transformita en pli multeutilan materialon.


La kakemono estas el silko de ĉirkaŭ tridek-centimetra kvadrato, sed jam fariĝis fulgokolora pro sia antikveco. Pendigita en obskura ĉambro, ĝi aspektas tiel griza, ke oni ne povas eĉ diveni, kio estas pentrita sur ĝi. La avo asertas, ke ĝi estas la bildo de malvo pentrita de Wang Ruoshui**. Li eltiras paŭlovnian keston unu aŭ du fojojn ĉiumonate el la ŝranketo muntita sur la muro, kaj, forviŝinte la polvon sur la kesto, zorgeme elprenas la kakemonon. Li pendigas ĝin sur la muro alta je unu metro kaj longe kontemplas ĝin. Efektive, se oni ĝin detale esploras, oni trovos grandan desegnaĵon similan al malnova sango-makulo sur la fono nigreta pro fulgo. Troviĝas ankaŭ alikoloriĝintaj lokoj, de kie ŝajne defalis io simila al verdigro. Turnante sin al la obskura, antikva ĉina pentraĵo, la maljunulo tute for-

gegas la mondon, kiun li travivis tro longe, kiel li mem opinias. Li fiksas sian rigardon sur la bildo iufoje fumante cigaredon, aliffoje trinkante teon, kaj en ceteraj fojoj li nur kontemplas ĝin senfare. Kiam liaj nepoj alkuras apuden kaj preskaŭ estas tuŝontaj la bildon, kun krio: "Kio estas tio, avo?" La avo kvazaŭ revokita el revo, admonas ilin: "Detenu viajn manojn de la bildo!" Kaj li lante starigas sin por volvi la pentraĵon. Tiam la nepoj demandas la maljunulon: "Avo! Donu bombonojn!" "Mi donos ilin poste, do vi ne faru petolaĵon," li respondas kaj volvas la kakemonon malrapide, metas ĝin en la keston, kiun li enŝovas en la ŝranketon. Poste li eliras el la domo por promeni en la ĉirkaŭaĵo, kaj survoje hejmen li aĉetas ĉe la najbara butikoj du papersaketojn da mentospicitaj bombonoj. Li donas ilin al la nepoj, dirante: "Jen, la bombonoj!" Ĉar lia filo edziĝis malfrue, liaj nepoj estas nur ses- kaj kvar-jaraj.

Li revenis hejmen kun la kesto ankoraŭ en la brako.



Frue en la mateno tuj post la tago, en kiu li konsiliĝis kun la filo, li envolvis la paŭlovnian keston en paktukon kaj eliris el la domo. Sed li revenis hejmen kun la kesto ankoraŭ en la brako, je ĉirkaŭ la kvara horo. La nepoj venis renkonte al li en la vestiblon kaj demandis: “Ĉu vi kunportis bombonojn, avo?” Sed li respondis nenion kaj iris en sian ĉambron. Li tiam elprenis la kakemonon, kiun li pendigis sur la muro kaj kontemplantis sinforĝese. Laŭ sia raporto, li vizitis kvar aŭ kvin kuriozaĵistojn, sed ili ne havis tiom da respekto al la pentraĵo, kiom li atendis de ili, kun kritiko, ke mankas al ĝi subskribo, aŭ ke la farbo estas defalinta ĉe kelkaj lokoj.



Li kontemplantas la bildon pendantan sur la muro de la bonorda ĉambro por te-ceremonio.

La filo konsilis lin, ke li ne turnu sin plu al kuriozaĵistoj. Ankaŭ li mem diris, ke li jam ne emas negoci kun komercistoj.

Post proksimume du semajnoj, la avo eliris eksteren refoje kunportante la paŭlovnian keston. Ĉi-foje li vizitis iun amikon de la superulo de sia filo, kun ties letero de prezentado en la sino. Ankaŭ tiun ĉi fojon li revenis hejmen ne aĉetinte bombonojn. Tuj kiam la filo revenis, li diris: “Kiel mi povus cedi ĝin al tia fiulo tute ne havanta juĝkapablon? Ĉio en lia domo estas falsajo!” Li diris tion, kvazaŭ tio estus pro la senvirteco de la filo. Ĉi tiu nur amare ridetis.

En la komenco de februaro, la maljunulo fine sukcesis vendi la kakemonon al iu diletanto pere de bonega peranto, kun kiu li hazarde konatiĝis. Li tuj iris al Janaka***, mendis belegan tomboŝtonon por sia mortinta edzino kaj deponis la restan

sumon en la poŝta ŝparkaso. Post kelkaj tagoj li iris promeni kiel kutime kaj revenis hejmen ĉirkaŭ du horojn pli malfrue ol iam ajn. Tiam li kunportis po du grandajn papersakojn da bombonoj en ambaŭ manoj. Li klarigis, ke li vizitis la diletanton por peti permeson denove rigardi la bildon, ĉar li ankoraŭ estis maltrankvila pri ĝi, kaj ke li trovis ĝin kviete pendanta sur la muro de la bonorda ĉambro por te-ceremonio. En la vazo antaŭ ĝi floris belaj floroj de flava umearbo kun petaloj preskaŭ diafanaj, kaj li estis regalita per teo en la ĉambro. “Verŝajne ĝi estos pli sekura tie, ol ĉe mi,” li diris al la filo. La filo respondis, ke povas esti tiel. La infanoj manĝadis la bombonojn preskaŭ dum tri tagoj.

Trad. **SIGER UJEKI** (Japanio)

— el “Verketoj en printempaj tagoj” (1909)

* *S. Nacume (1867-1916), pseŭdonimo de Nacume Kinnosuke, elstara figuro de la moderna japana literaturo. Li naskiĝis en familio de malgranda ŝtatoficisto. En sia juneco li legis milojn da ĉinaj klasikaj poemoj kaj prozaj verkoj, el kiuj li ĉerpis materialon por riĉigi sian unuan romanon “Mi Estas Kato”, per kiu li kritikis la mallumon en la socio. Li havis profundan influon al la japana literaturo. Li ne nur estis la plej populara verkisto en sia tempo sed ankaŭ estas multe ŝatata hodiaŭ de la japana popolo.*

** *Wang Ruoshui — ĉina pentristo de Yuan-dinastio (1279-1368 p.K.), tre lerta en pentrado de floroj, birdoj, bambuoj kaj ŝtonoj.*

*** *Janaka — kvartalo en Tokio, kie troviĝas vasta tombejo.*

TRI NOVAJ KARAKTERIZAJOJ DE LA ĈINA EKONOMIO

Ĉi-jare en la ĉina ekonomio aperis tri novaj rimarkindaĵoj. Unue, la disvolviĝa rapideco de la nacia ekonomio estas pli granda ol la taksita. La profito kaj imposto, kiujn industriaj entreprenoj pagis al la ŝtato, plimultiĝis je 10% kaj produktokvantoj de plejpartaj industrioj havas kompare grandan kreskon. Due, evidente releviĝis la produktado de la peza industrio, kiu malleviĝis pasintjare. Trie, la merkato por komercaĵoj eksterordinare prosperas. Nun la ĉeftasko de la ŝtato ankoraŭ estas altigi la ekonomian efikecon.

RAPIDA DISVOLVIĜO DE LA ŜIP-INDUSTRIO DE ŜANHAJO

En la pasintaj du jaroj Ŝanhajo ricevis fremdlandajn mendojn de kvindek unu ŝipoj kun totala kapacito de kvincent kvindek mil toneloj, kiu okupas pli ol 60% de tiu de la tuta lando.

Nun Ŝanhajo fabrikas diversajn civilajn ŝipojn, inkluzive de oceanaj var- kaj petrol-ŝipoj, prospektoraj ŝipoj super dekmil-toneloj, kvinmil-tonelaj proksimamaraj ŝipoj por pasaĝeroj kaj varoj, glacirompaj ŝipoj, ŝvebaj ŝipoj, retotrenaj ŝipoj, dragŝipoj kaj savboatoj. Krome la Ŝanhajaj ŝipfabrikoj jam komencis konstrui ocean-ekspluatan ŝipon, surmarajn drilmaŝinajn platformojn k.a.

En Ŝanhajo troviĝas naŭ ŝipfabrikoj kaj kvar marnavig-instrumentaj fabrikoj, el kiuj ĉiu havas sian projektan kaj esploran fakon.

LA PLEJ LONGA ŜOSEPONTO EN ĈINIO

La plej longa ŝoseponto en Ĉinio, Luzhou-a Jangzi-rivera Ŝoseponto en la provinco Sichuan,

komencis konstruiĝi en oktobro 1976 kaj funkcios ekde la 1-a de oktobro ĉi-jare. Ĝi longas je 1 255.6 metroj, ĉiu el la tri ĉefaj spanoj largas je 170 metroj, la suda kaj norda alkondukaj vojoj al la ponto longas je sep kilometroj. La ĉefponto altas 45 metrojn super la riversurfaco en la akvomanka sezono.

ĈINIO DONIS AL PLI OL OKMIL HOMOJ LA MAGISTRAN TITOLON

Ĉinio unuafoje donis magistran titolon al 8 562 esplorstudentoj el dek unu mil diplomitaj esplorstudentoj de 1981. Inter ili 6 992 estas el altlernejoj kaj la ceteraj el sciencaj institutoj. Ili donis sian diploman disertaĵon kaj plenumis koncernajn respondojn. La Juĝa Komitato de la koncernaj institucioj ekzamenis ilin unu post alia kaj faris decidon pri la titolo per sekreta balotado.

TIBETAJ JUNULOJ EN LERNADO DE LA TRADICIA ARTO

En 1981 koncernaj fakoj de la provinco Qinghai sendis pli ol cent tibetajn junulojn al la templo Tar lerni por heredi tibetajn artojn de butera skulptado, brodado, pentrado kaj ligna gravuro.

La templo Tar estas la sanktejo de la ĉina lamaismo konstruita en 1577. Tibet-stila rulpenetraĵo, brodaĵo spegulanta budhisman rakonton kaj floro knedita el diverskoloraj buteroj estas nomataj "La Tri

Trezoroj" de la templo. En la pasintaj multaj jaroj tibetaj artistoj en la templo kreis pli ol dudek mil elstarajn pentraĵojn kaj brodaĵojn.

LA UNUA KAVERNA MUZEO KONSTRUOTA EN ĈINIO

Ĉinio konstruos la unuan kavernan muzeon en la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono en suda Ĉinio.


La muzeo estos en la kaverno Blanka Lotuso, dek du kilometrojn for de la urbo Liuzhou. La kaverno estis trovita en 1953. Ĝia ĉefkaverno kun pli ol 70 kvadrataj metroj altas je pli ol dudek metroj. En la pasintaj jaroj oni tie trovis riĉan kulturen restaĵon kaj homajn fosiliojn. La geologia strukturo apartenas al la malfrua periodo de la plejstoceno kaj ĝia kulturo apartenas al la malfrua periodo de la paleolitiko aŭ eble al la pli malfrua mezolitiko.

La Kaverna Muzeo Blanka Lotuso denove aperigos la kavernan vivon de la antikvaj homoj per skulptaĵoj kaj freskoj.

ALTSALTA ĈAMPIONO DE AZIO

La 20-an de junio, en la Ĉina Atletika Konkurso, la fama 19-jara ĉina altsaltisto Zhu Jianhua rompis per 2.31 metroj la azian altsaltan rekordon de 2.3 metroj, kiun li akiris pasintjare en Tokio.

Zhu Jianhua en altsaltado



Ulrich Lins en Ĉinio

ĈINAJ ESP-ISTOJ



Fotoj de YAN JIN



Zhang Qicheng interparolas kun Ulrich Lins.

S-ro Ulrich Lins, komisiito pri eldonado de UEA, vizitis Ĉinion de la 17-a ĝis la 21-a de junio. Li faris traktadon pri presado de libroj por UEA kun Zhang Qicheng, la ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj Liu Ling, respondeculo pri eldonado de ĈEL.


Akompanate de pekinaj esperantistoj s-ro Ulrich Lins vizitis vidindajn lokojn en Pekino.

Por bonvenigi s-ron Ulrich Lins, pekinaj esperantistoj okazigis kunsidon, kiun ĉeestis ankaŭ niaj francaj samideanoj geedzoj Hervouet kaj sveda esperantistino Agneta Götlind kaj ŝia filino, kaj la brita esperantisto Geoffrey Sutton, kiu laboras en la redakcio de El Popola Ĉinio. La kvin-landaj esperantistoj kune pasigis ĝojajn horojn.


Dum s-ro Ulrich Lins estis en Pekino, lin intervjuis ĵurnalistoj de Radio Pekino kaj faris apartan programeron pri tio.

En la kunsido






Ĉina esperantistino kune kun sveda esperantistino Agneta Götlind kaj ŝia filino



Akrobataĵo



Junaj ĉinaj esperantistinoj kaj francaj esperantistoj geedzoj Hervouet



INTERESAJ LUDILOJ


Fotoj de WANG SHOULIANG



Tamburas ursidoj.



Kiel interese!



S-ro Ulrich Lins (la kvina de dekstre)
kaj s-ro Geoffrey Sutton (la kvara de
dekstre) en la Dek Tri Maŭzoleoj de
Ming-dinastio

En la Somera Palaco



Infano kaj ĝia karulo



Trotilo



Malgrandaj arki-
tektoj

Bona franjo, kie vi estas?

La letero de montvilaĝa junulino, kiu serĉas fratinnon, estis publikigita en la Pekina Tagjurnalo je la 6-a de junio ĉi-jare. Ni reaperigas ĝin en nia gazeto, esperante ke ĝi helpos niajn legantojn kompreni la moralon de la junuloj en la hodiaŭa Ĉinio.

Karaj redaktoroj,

Mi estas montvilaĝa junulino de Miyun-gubernio. Mi volas rakonti al vi mian spertajon, esperante ke vi, per via ĵurnalo, honoru homon kun nobla konduto kaj krome ke vi helpu min trovi la franjon respektindan, kies nomon mi ne scias.

En majo ĉi-jare mia frato suferis de lastaperioda hepatosklerozo kaj estis portita al la hospitalo Beida en Pekino. La 8-an de la monato la malsano de mia frato fariĝis kriza. La hospitalo petis, ke familiano rapide alsendu monon. Tiutempe miaj patro kaj bofratino flegis lin en la hospitalo. Mi kaj mia patrino restis en la hejmo. Informite pri la sanstato de mia frato, mi, junulino kun aĝo de iom pli ol 20 jaroj, neniam enirinta urbon, devis iri en la urbon por vidi la fraton.

La sekvan matenon, per longdistanca aŭtobuso mi atingis la gubernian urbon kaj de tie veturis aŭtobuse al Pekino. Mi ne sciis, kie estas la hospitalo Beida, kaj en timeto mi demandis la konduktoron: "Kiel mi iru al la hospitalo Beida?" "Per la 107-linia trolebuso," ŝi respondis malpacience.

Ĝuste kiam mi estis en embaraso, mi sentis, ke iu post mi tiras min per mano. Mi turnis la kapon malantaŭen kaj vidis, ke tiu estas franjo iom pli aĝa ol mi. Ŝi afable cedis al mi sidlokon. Rimarkinte ke mi estas en malfacilo, ŝi konsolis min: "Bona fratino, ne maltrankviliĝu, mi akompanos vin al la hospitalo Beida." Survoje ŝi distris min. Kaj ŝi diris, ke kiam ŝi venis al Pekino

unufoje, ankaŭ ŝi kondukis provincale kaj al kutimiĝis al la medio nur post kelka tempo. Se diri la veron, mi timis ĉe la ekiro humiligadon de la urbanoj. Tamen ŝi estas tiel afabla kaj familiara al mi. Sidante apud ŝi, mi multe malpeziĝis en la koro. Forlasinte la trolebuson ĉe Dongzhimen, la franjo aĉetis por mi glaciaĵon kaj kelke da pomoj por mia frato. Mi estis tiel emociita, ke mi ne povis diri

En duonkonscio mi aŭdis, ke iu ploras kaj vokas . . .





Si sincere konsolis min kaj kondukis min al la aŭtobusa stacio.

kelkajn dankajn vortojn. Mi baldaŭ atingis la hospitalon dank' al ŝia gvido. Sed, tute neatendite, mia frato jam forpasis en la mateno. Mi tuj svenis aŭdinte la vortojn de la kuracisto.

En duonkonscio mi aŭdis, ke iu ploras kaj vokas: "Franjo, vekigu." Malferminte la okulojn, mi konsciis, ke mi kuŝas en la brakoj de la franjo, kiun mi ekkonis antaŭ kelkaj horoj. Ŝia vizaĝo tiam estis plena de larmoj, kaj ŝi proponis al mi mallaŭte, ke ŝi akompanu min hejmen. Sed kiel mi povus foriri sen la lasta vido de mia frato? Ŝi do eliris interkonsiliĝi kun kuracistoj. Poste, mi alvenis al la kadavrejo en ŝia akompano. Sed kia malfeliĉo, la korpo de mia frato jam estis sendita al la kremaciejo antaŭ duonhoro. Kie estas la kremaciejo? La stato stuporigis min. La bonkora franjo kaj mi hastis per metroo al la kremaciejo. Tie la kremaciisto diris: "La kadavro estas

kremaciata. Ĵus foriris ties familianoj. Vi prenu la cindron morgaŭ." Kion fari? Mi ne sukcesis havi la lastan vidon de mia frato, nek sciis, kien iris la patro kaj bofratino. Mi denove esploris, ne povante regi min. Tiam ŝi memorigis al mi: "Ĉu vi ne diris, ke via bofrato laboras ie en la proksima antaŭurbo de Pekino? Ni iru tien."

Pro la malĝojo kaj laciĝo mi kapturiniĝis kaj naŭziĝis survoje. Vidante tion, ŝi donis al mi pomon, kaj kiam mi estis vomonta, ŝi tuj elpoŝigis sian mantukon por mi, kaj frapadis al mi la dorson. Post kiam ni eliris el la aŭtobuso, ŝi aĉetis por mi glason da malvarma teo, por ke mi gargaru. Bona franjo mia, vi traktis min eĉ pli zorgeme ol vera fratino. Tiam mi eksciis, ke estas jam post la 5-a vespere. Ŝi aĉetis por mi manĝaĵon, sed mi neniom volis manĝi. Rimarkinte tion, ankaŭ ŝi ne manĝis. Per aŭtobuso ni atingis la lokon kie mia bofrato loĝas. Kiam ŝi cer-

tigis, ke mi povas trovi la hejmon de mia bofrato, ŝi diris, ke ŝi ne plu akompanu min. Mi multe kvietigis kaj petis ŝin ripozi kelkan tempon en la hejmo de mia bofrato. Tiam ŝi kaptis mian manon kaj diris: "Mia kara fratino, je la 4-a posttagmeze komenciĝas mia skipo. Se mi iros kune kun vi al la hejmo de via bofrato, mi malfruos al la skipo pli multe." Tion dirante, ŝi enmanigis al mi la pomojn kaj daŭrigis: "Multe konsolu viajn gepatrojn kaj bone atentu pri via sano!" Post tio, kun bedaŭro rigardinte al mi, ŝi eniris aŭtobuson. Kiam la aŭto startis, larmoj tuj elfluis el miaj okuloj. Kelkajn paŝojn mi kuris antaŭen kaj kriis: "Franjo, kiel vi nomiĝas?" "Vi nomu min simple fratino."

Kvankam multaj tagoj pasis tamen la afero kvazaŭ okazus tuj antaŭe kaj ŝiaj voĉo kaj mieno gravuriĝis neforviŝeble en mia memoro. Mi malgajis kaj bedaŭris pri tio, ke la franjo akompa-

nis min unu tutan tagon, sed mi forgesis demandi pri ŝiaj nomoj kaj adreso. Bona franjo mia, post la adiaŭo en tiu tago, mi baldaŭ trovis la patron kaj la bofratinon. Mia tuta familio sopiras vidi vin. En la 9-a de majo mi perdis la fraton, sed fratinon mi akiris. Ĝis nun mi trovis neniun rimedon por revidi vin. Kia ĉagreno mordas mian koron! Mia kara franjo, kie vi estas? Bonvolu skribi al mi! Dirite elkore, mi ne celas esprimi al vi dankon, ĉar mi scias, ke vi tion neniam postulos de mi. Mi serĉas vin pro tio, ke mia tuta familio sopiras vin.

Karaj redaktoroj, tiu franjo, kiun mi serĉas, estas en la aĝo de ĉ. 25 jaroj, mezastatura, kun blanka, ronda vizaĝo kaj du mallongaj harplektaĵoj. Tiun tagon ŝi portis kun si blankan mansaketon el arta ledo kaj bazarreton. Mi petas, ke vi helpos min trovi ŝin kiel eble plej frue!

Zhou Yurong

Komunumano de Daling-taĉmento de Hedong-brigado de Gubeikou-komunumo, Gubernio Miyun.

(Daŭrigo de p. 26)

groteskaj montpintoj. Malproksime oni kvazaŭ vidas, ke maljunulo en ornato silente sidas kun la manparo sur siaj genuoj. Laŭ legendo, la maljunulo estis gardisto de la palaco de la Orienta Drakoreĝo. En tiu jaro, kiam la ĉielaj trupoj atakis la palacon, oni ne atencis lin pro lia maljuneco. Nun li ankoraŭ restas tie, kvankam la palaco fariĝis seka grundo.

La ĉarma natura pejzaĝo de la monto Guifeng magnete altiras turistojn. Nun pli kaj pli multiĝas homoj, kiuj iras tien por ripozi, somerumi aŭ ekskursi.

Du ujguraj fabloj

Papago kaj najtingalo

PPAPAGO pretendis, ke neniu en la mondo kantas pli bele ol ĝi. Ĝi kantadis tuttage. Tio tedis la mastron, kaj li translokis la birdkagon en la fruktoĝardenon kaj pendigis ĝin sur arbo. La papago tre ĉagreniĝis pro tio. Ĝuste en tiu tempo alflugis najtingalo kaj ĝin salutis. La papago rakontis al la najtingalo sian malfeliĉan travivaĵon. "Najtingalo, intima amiko mia," la papago vee diris, "mi aŭdis, ke vi estas genia kantisto kaj oni tre ŝatas aŭskulti vian kanton. Mi kantas neniel malpli bele ol vi. Sed mia mastro jam tediĝis je aŭdo de mia kanto. Li eĉ translokis min en tiun ĉi dezertan fruktoĝardenon kaj ne volas min rigardi. Kara amiko, diru bonvole, kial mia mastro tiel traktas min. Se mi havus ian mankon en la kantado, bonvolu min helpi. Ĉu bone?"

"Bone! Bonvolu kanti por mi," diris la najtingalo.

La papago plengorĝe kantis. Ĝi


kun etendita kolo ĉiel klopodis por kanti pli bele. Ĝi faris unue kokerikon, klukon, poste miaŭon, bojon . . . Unuvorte, ĝi kantis multajn kantojn, kiujn ĝi lernis de aliaj.

Fininte la kantadon, la papago demandis kun plena memfido: "Kiel vi opinias? Tiel belajn kantojn kun malsamaj stiloj vi eble neniam aŭskultis dum via tuta vivo."

"Tiujn kantojn, kiujn vi ĵus kantis, mi ofte aŭdas. Ĉu ili ĉiuj ne estas alies kantoj? Ne kantu alies kantojn, bonvolu kanti vian propran por mi!" diris la najtingalo.

Aŭdinte la vortojn de la najtingalo, la papago miris, ke tiu amiko ne donis al ĝi laŭdon, kaj ne sciis kiel respondi. Post momento, la papago denove laŭte kantis. Sed ili ankoraŭ estis la samaj.

"La problemo ĝuste kuŝas en tio!" La najtingalo interrompis la kanton de la papago, "Vi ĉiam kantas laŭ alies tono. Nenia novo estas en via



Papago ekkantas plengorĝe.

kantado, tial via mastro malŝatas vin. Vi devas kanti viajn proprajn kantojn, kaj per ili impresi la aŭskultantojn.” Ĉe tio la najtingalo skuis la kapon kaj diris: “Tamen,

vi jam kutimas kanti alies kantojn. Estas tre malfacile por vi, ke vi kantu vian propran kanton. Kredeble vi ne povas atingi tion sen klo-podo.”

Saĝa Melo

IUTAGE malsata lupo estis serĉanta ĉasajon en dezerto kaj feliĉe renkontis dikan melon. “Ho? kiel bela frandaĵo!” La lupo estis tiel ĝoja, ke eĉ ĝiaj oreloj moviĝis pro la rido. La lupo afable diris: “Ho, bona amiko mia, de kie vi venas kaj kien vi iras?” Ĝi estis en bona humoro.

La melo jam rimarkis la malican intencon de la lupo kaj diris sagace: “Hej! mia fraĉjo! Por serĉi vin mi trairis montojn kaj valojn. Estas feliĉe, ke mi renkontas vin ĉi tie. Mi alvenas por inviti vin gastigi ĉe mi!”

La lupo subite montris sian kruelan bestecon: “Ha, ruza aĉulo, ĉi eĉ aŭdacas trompi min! Mi ne estas tia stulta lupo, facile trompebla. Hodiaŭ, mi formanĝos cin.”

La lupo ĵetis sin al la melo kaj kaptis ĝin.

La melo estis neniom konsternita kaj aplombe diris: “Ho, stultulo! Ĉu vi scias kiel manĝi min? Se vi

havas talenton, do manĝu kiel via patro.”

Aŭdinte la vortojn neniam aŭditajn, la lupo mirigite demandis: “Kiamaniere mia patro manĝis?”

“Se vi volas aŭskulti, mi diru al vi,” diris la melo. “Via patro neniam estis tiel stulta kiel vi. Post kiam ĝi kaptis min, unue portis min sur la dorso kaj poste po tri fojoj ĵetis min al ambaŭ flankoj de la vojo. Post tio, ĝi komencis manĝi min. Mi ne scias, pro kio ĝi tiel faris.”

La lupo pensis en si, ke eble estas sekreto en tio. Ĝi do imitis sian patron. Unue ĝi levis la melon kaj poste ĵetis ĝin flanken de la vojo. La melo rapide kuris en kaveton apud la vojo.

La kruela lupo kriis laŭte: “Ĉi trompis min!”

La melo sin kaŝis en la kavo kaj fiere diris: “Mia saĝa patro ĉiufoje tiel mistifikis vian stultan patron.”



Lupo milde demandas: “Mia kara amiko, de kie vi venas kaj kien vi volas iri?”



EN la jaro 221 a.K. Qin-regno pereigis la aliajn ses regnojn kaj tiel finis la kaosan situacion, kiu regis dum la pli ol 500 jaroj de la periodoj Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj, per fondo de la unua unuigita centralizisma feŭda ŝtato en la ĉina historio.

LA UNUA FEŬDISMA IMPERiestRO DE ĈINIO

Post kiam Ying Zheng, la reĝo de Qin-regno, unuigis Ĉinion, li sin titolis la Unua Imperiestro, revante pri eterna regado fare de sia idaro.

La Unua Imperiestro de Qin-dinastio abolis la vasalan sistemon de Zhou-dinastio kaj ekpraktikis provincan kaj gubernian sistemon, laŭ kiu li dividis la landon en 36 provincojn (poste en 40). La imperiestro persone nomumis lokajn altrangulojn, kiuj ne rajtis heredigi sian oficon al la filoj. Por antaŭmalhelpi separatismen la imperiestro povis iam ajn ŝanĝi ilian postenon kaj tenis ĉiujn militajn kaj politikajn potencojn en siaj manoj. Tio estis la centralizisma feŭda reĝimo. En la pasintaj pli ol dudek jarcentoj

Qin-regno Unuigis Ĉinion

de BA HONG

senĉese ŝanĝigis la feŭdaj dinastioj de Ĉinio, sed la feŭda reĝimo kreita de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio estis daŭrigita.

La Unua Imperiestro de Qin-dinastio estis ambicia kaj sagaca politikisto. Post la unuigo de Ĉinio li aplikis multajn unuigajn rimedojn en la juro, ekonomio, kulturo, trafiko kaj aliaj branĉoj. Li publikigis kaj praktikis la leĝojn de Qin-dinastio en la tuta lando, kio eliminis la kaosan leĝaron en la periodo Militantaj Regnoj. Qin-dinastio projektis la feŭdan ekspluatatan sistemon, subpremis la kontraŭstaron kaj bataladon de la kamparanoj kaj limigis la privilegiojn de la falintaj nobeloj por malhelpi ilian restaŭron. Li ordonis muldi rondajn kuprajn monerojn kun kvadrata truo meze por elimini la pasintan monsysteman kaoson kaj la malfacilon en kalkulado, kio multe faciligis la tiaman cirkuladon de varoj. Li unuigis la mezursistemon en la tuta lando kaj difinis normajn mezurilojn. Li ordonis reformi la skriblingvon, kio eliminis la kaoson de skribado en malsamaj lokoj. Li ordonis ankaŭ konstrui porĉaran vojon laŭ la difinitaj normoj en la lando. La vojbazoj estis alta kaj fortika,


ankaŭ la interrada distanco de la ĉaroj estis unuigita. Ĉio tio akcelis tiamajn trafikajn disvolvigojn kaj ekonomian aktivadon.

Sed li estis ankaŭ tre kruela

imperiestro. Li ordonis forbruligi ĉiujn historiajn librojn krom tiuj de Qin-regno kaj kondamnis al la morto tiujn, kiuj kaŝis malpermesitajn librojn aŭ kritikis la

La Unua Imperiestro de Qin-dinastio





Gubeikou, grava trapasejo de la Granda Muro

registaran politikon. Li ordonis kondamni 460 intelektulojn al la morto, ĉar ili estis malkontentaj pri la imperiestro kaj kritikis lin.

DEKMIL-LIA GRANDA MURO

Por defendi la nordan limregionon kontraŭ la enbrudo de hunoj, la Unua Imperiestro de Qin-dinastio ordonis kunligi kaj ripari la murojn konstruitajn de la regnoj Yan, Zhao kaj Qin en unu grandan muron. De Lintao en la provinco Gansu en la okcidento ĝis la orienta parto de la provinco Liaoning en la oriento, ĝi longas je 2 500 kilome-

troj. Historie oni nomis ĝin la Dekmil-lia Granda Muro (unu lio egalas al duona km.).

Por konstrui kaj ripari la Grandan Muron, Qin-dinastio rekviziis centmilojn da laboruloj. La konstruado daŭris pli ol dek jarojn kaj la peza laboro forrabis la vivon de multaj homoj. La Granda Muro plejparte estis konstruita surbaze de monteĝo. Ĝia alteco estas malsama de 5 ĝis 10 metroj kaj ĝiajn iujn sektorojn oni konstruis sur montoj 1 300 ĝis 1 400 metrojn altaj. Ĝi estas malpli alta sur kruta loko kaj pli alta sur ebena loko. Fuorto troviĝas sur ĝi

post ĉiu proksimume 130-metra distanco kiel gvatejo. Ĉe ĉiu grava trapasejo estas konstruita alarma turo. Kiam la militistoj en ĝi rimarkis atakajn malamikojn, ili tuj alarmis tage per bruligo de herboj por eligi densan fumon kaj nokte per bruligo de brulligno miksitaj kun sulfuro kaj salpetro por eligi fajron.

Nun ankoraŭ restas ruinoj de kelkaj sektoroj de la Qin-dinastia muro, ekzemple ĉe la nordokcidento de Datong en Shanxi-provinco kaj en la proksimo de Min-gubernio en Gansu-provinco. La nuna Granda Muro estis konstruita de Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) kaj estas pli ol 6 300 kilometrojn longa.

En Ĉinio cirkulis popola rakonto pri la Granda Muro konstruita de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio. Iu junulo Fan Xiliang estis rekviziita ne longe post sia edziĝo por konstrui la Grandan Muron. Lia juna edzino Meng Jiangnŭ esperplene iris serĉi la edzon pro sopirego, kunportante kotonvatajn vestojn por la edzo. Atinginte la Grandan Muron post multaj malfaciloj, ŝi informiĝis, ke la edzo jam mortis en la peniga laboro. Ŝi ploregis antaŭ la Granda Muro tri tagojn kaj noktojn, kio fine kortuŝis la ĉielan dion, tiel ke la Granda Muro falbreĉiĝis. La rakonto spegulas la suferon de la popoloj kaŭzitan de la konstruado de la Granda Muro.

LA MAŬZOLEO ĈE LA MONTO LISHAN KAJ LA KAVO KUN ARGILAJ MILITISTOJ KAJ ĈEVALOJ

Krom grandskala konstruado de la porĉaraj vojoj, la Granda Muro kaj la palacoj, la Unua

Imperiestro de Qin-dinastio ankaŭ rekviziis pli ol 700 000 laborulojn por antaŭkonstrui por si maŭzoleon ĉe la monto Lishan (nun oriente de Lintong en Shaanxi-provinco). La konstruado de la maŭzoleo daŭris 36 jarojn de lia surtroniĝo, kiam li havis 13 jarojn, ĝis li mortis 50-jara. Historia literaturo rakontas, ke en la maŭzoleo oni konstruis grandiozajn palacojn kaj konservis sennombrajn rarajn trezorojn.

En la jaro 210 a. K., la Unua Imperiestro de Qin-dinastio mortis pro malsano. Lia filo Huhai, la Dua Imperiestro de Qin-dinastio, ordonis enterigi ĉiujn maŭzoleajn konstruintojn pro timo, ke malkaŝiĝos la sekreto pri la maŭzoleo. La maŭzoleo estas 116 metrojn alta kaj 600 metrojn longa, sed ĝia interno hodiaŭ restas sekreto.


Printempe de 1974, kamparanoj de Lishan fosis puton ĉirkaŭ

mil metrojn nordoriente de la maŭzoleo kaj trovis argilajn figurojn de Qin-dinastio antaŭ du mil jaroj. La posta prifosado konstatis, ke ili estas argilaj militistoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro. La elterigitaj argilaj militistoj altas 1.8 metrojn kaj la argilaj ĉevaloj altas 1.5 metrojn kaj longas 2 metrojn. En la kavo troviĝas pli ol 6 000 argilaj armitaj militistoj. El tiu trovo oni povas imagi al si la grandan gvardion de la Unua Imperiestro. Nun oni tie jam konstruis la Muzeon de Argilaj Militistoj kaj Ĉevaloj de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio.

Dum la regado de la Dua Imperiestro de Qin-dinastio, la pezaj servuto kaj imposto kaj severa puno pelis la popolon en senelirejon. Fine popola ribelo renversis Qin-dinastion, kies regado daŭris nur ĝis ĝia dua imperiestro.



Elterigitaj argilaj militistoj kaj ĉevaloj





En vilaĝo de dungoj

de PENG ZHENGYANG

Dunga knabino

LA dungoj, kiuj loĝas en montregionoj inter Guizhou, Hunan kaj Guangxi en suda Ĉinio, havas siajn **proprajn** morojn. Por koni tiun nacimalplimulton mi vizitis la Dunganaciecan Aŭtonoman Gubernion de Hunan-provinco, en marto ĉi-jare, kaj propraokule vidis ilian vivmanieron.

EMINENTAJ KONSTRUAĴOJ

Mi aŭte veturis en la gubernion de dungoj, kaj en miajn okulojn falis terasaj kampoj kaj malrapide fluantaj riveretoj kun verdaj montoj en la ĉirkaŭaĵo. Iliaj domoj staris vice unuj post aliaj apud la akvo.

Ĉiuj domoj estas faritaj el ligno. Por ilin konstrui la dungoj uzas lignajn kojnojn anstataŭ

najlojn. La fortikaj domoj en malsamaj formoj povas elteni preskaŭ du jarcentojn.

La turo de sonorilo kaj tamburo, la ornama ponto kaj la kiosko de vento kaj pluvo estas rigardataj kiel tri trezoroj de la dungoj, kiuj tre fieras pri iliaj eminenta arkitekturo kaj bela formo. La turo de sonorilo kaj tamburo estas loko, kie dungoj kolektiĝas por diskuti pri siaj aferoj kaj ellabori regularon por sia vilaĝo, ripozas aŭ sin distras. Ĉiuj vilaĝoj havas po unu tian turon kaj la grandaj vilaĝoj po tri aŭ kvar. La malsupra parto de la turo estas kvadrata kaj la supra havas plurajn angulojn kun larĝaj tegmentrandoj unu super alia. La tuta turo simila al pagodo aspektas tre impone. Ne

ĉiuj turoj estas de egala alto, kaj la plej alta havas dek kvin etaĝojn. Sur la tegmentrandoj estas bele skulptitaj drakoj, feniksoj, floroj kaj birdoj. La ornama ponto staras super rivero interkruĉanta kun grava tervojo kondukanta al tiu kaj tiu vilaĝoj. Tiaj pontoj ne havas la saman longecon. Sur ĉiu ponto estas unu ĝis kvin kioskoj, kiujn kunligas tegolita galerio kun balustradoj kaj benkoj ambaŭflanke. La tegmento, la galerio kaj la kiosko, ĉiuj surhavas gravuraĵojn. La ornama ponto servas kiel ripozejo por la vojirantoj kaj vidinda loko por turistoj. La kiosko de vento kaj pluvo, nomata ankaŭ somera kiosko, staras gracie apud ŝoseo aŭ vojeto.

ORIGINALAJ TRINKAĴOJ KAJ MANĜAĴOJ

Mi vizitis Yao Rongyi, plejagulon respektatan de tieaj dungoj kaj faman kantiston en tiu loko. Li bone konas la morojn de la dungoj. En sia nove konstruita trietaĝa domo li varme akceptis min. Li sidigis min ĉe fajro. Lia edzino unue fritis sekigitan gluan rizon, metis tefoliojn en varmigitan oleon en pato, turnadis ĝin kaj dekoktis ĝin kun akvo, kaj poste ŝi infuzis la frititan rizon per tiel preparita tea suko. Ŝi prezentis al mi bovlon da tia trinkaĵo. Ŝi metis sur la bovlojn po unu manĝbastoneton. La bongusta trinkaĵo povas kvietigi malsateton kaj soifon, sed la trinkmaniero estas tre originala. Laŭ dunga moro, la gasto devas horizontale meti la manĝbastoneton sur la bovlon por montri, ke li ne plu deziras pro sufiĉa trinkado. Alie la mastro prezentos al li duoble, t. e. la gasto devas trinki du bovlojn post unu kaj kvar post du. En la gubernia urbo mi aŭdis, ke ĉe iu dungo gastis vicprofesoro pri metiarto veninta al vilaĝo de dungoj por esplori iliajn vestojn. La vicprofesoro, kiu ne konis la lokan moron, trinkis tri bovlojn da trinkaĵo unufoje. Kiam la mastro volis duoble prezenti al li la trinkaĵon, tiu petegis, ke li ĉesu prezenti la trinkaĵon.

La dungoj havas abundan tagmanĝon kun amara vino kaj glua rizo. La tablo estas plena de preskaŭ acidaj pladoj el peklaĵoj. La vino fakte ne estas amara, sed dolĉa kun koloro de verda umeo. Por prepari tian tradicion alkoholaĵon, oni faras fermentaĵon el kuirita glua rizo, verŝas sur ĝin certan kvanton da fontakvo kaj metas en poton por hermetika konservo dum tri ĝis kvin monatoj. Por prepari aci-

dajn pladojn, oni peklas viandon, fiŝojn kaj diversajn legomojn. Certa acida plado el ia helruĝa peklita riverfiŝo estas tre ŝatata de la dungoj, por kiuj acidaj manĝaĵoj estas nemalhaveblaj, ĉar ili sin nutras per gluarizo kaj la acido faciligas al ili la digestadon. Ili preparas acidajn pladojn ĉi-maniere: unue lavi viandon, fiŝojn kaj legomojn, sekigi ilin, miksi ilin kun glu-riza vino aŭ kun kuirita gluarizo, meti ilin tavolon post tavolo en poton, spici ilin per certa kvanto da salo kaj aliaj spicoj laŭ bezono de la preparaĵoj kaj ilia konservo-daŭro, poste meti grandan ŝtonon sur ilin kaj hermetike fermi la poton. Tiaj acidaj manĝaĵoj, onidire, povas konserviĝi dudek ĝis tridek jarojn.

Dum la manĝado la gemastroj montris sin tre afablaj. Komence mi ne kuraĝis tuŝi iliajn amaran vinon kaj acidajn pladojn, kiajn mi neniam antaŭe gustumis. Tuj kiam mi ekĝuis la bongustecon, mi laŭdadis kaj prenis sen skrupulo. Pro tio la gemastroj tre ĝojis kaj kontentis.

INTERESA GEEDZIĜO

Posttagmeze, akompanate de Yao Rongyi, mi iris viziti ilian vilaĝon en Pingyang. Miajn okulojn frapis versparo sur iu pordo: "Bonvolu halti gastoj antaŭ mia pordo, unue sonu laŭte via kanto-vorto." Yao klarigis al mi, ke antaŭhieraŭ okazis al ĉi tiu familio edziĝofesto. La versparo sugestas, ke la gratulantoj devas kanti, laŭ la dunga moro, antaŭ ol eniri la pordon. Tuj poste li rakontis al mi pri la geedziĝo de dungoj.

La dungaj gejunuloj starigas amrilaton laŭ sia volo. Vespere junuloj kelkope iras tra vilaĝoj kantante kaj biven ludante, kun

lanterno en mano. Lumas la domoj de la junulinoj, kiuj observas ĉe fenestro. Tiam la junuloj ekvizitas la familion de junulino sub iu aŭ alia preteksto. Se ŝi preferas iun el ili, ŝi elpensas rimedon por reteni lin, kiel ekzemple, prunti de li la lanternon. En tiu momento foriras ŝiaj familianoj inkluzive de ŝiaj gepatroj. Kaj la geamanta paro sidiĝas ĉe fajro, alterne kantas amkantojn per mallaŭta voĉo kaj interparolas por pli bone koni unu la alian. Jam estas profunda nokto. La junulino lasas sian amaton reveni hejmen nur post kiam la tempo kaj la loko por la dua renkontiĝo estas deciditaj. Kiam ili havas profundajn sentojn unu al la alia post kelka tempo da kontakto kaj konado, la junulino donacas al sia amato kolĉenon aŭ brakringojn kaj la junulo siavice donas al ŝi diverskolorajn silkajn fadenojn kiel ateston de la amo. Antaŭvespere de la geedziĝo la fianĉo, en la akompano de samvilaĝaj junuloj, vektoportas gluan rizon, blankan sukeron, porkan viandon, amaran alkoholaĵon kaj aliajn donacojn al la hejmo de la fianĉino. Antaŭ la mateniĝo la fianĉino, akompanate de junulinoj, iras kune kun la fianĉo al lia hejmo. La fianĉino devas porti sitelon da fontakvo, kiun ŝi pretigis anticipe, al la hejmo de siaj bogepatroj, verŝas la akvon en ilian akvuĵon kaj per tio fariĝas membro de ilia familio. Post la tagiĝo la parencoj kaj amikoj vektoportas donacojn por gratuli la feliĉan paron kaj la gemastroj devas regali ilin. Tuttage en la vilaĝo aŭdiĝas krakfajraĵoj kaj kantoj, ĉiuj festantoj dronas en ĝojo kaj gajeco.

Post sia edziniĝo la dunga junulino loĝas ne ĉe siaj boge-

Detruigo de arbaro — alia minaco al la homara ekzisto



NUNA KRIZO

Sciante, ke malmultiĝas tagon post tago la arbarejoj de la tuta mondo, la fakuloj laŭte krias: "Ne la petrolo, sed la arbaro hodiaŭ estas en krizo!" Tio ne estas senkaŭza agitado, sed vera fakto.

Pro la longtempa senbrida hakedo al la arbaro, la homaro estas pli kaj pli severe punata de la naturo. Antaŭe oni opiniis, ke la arbaro nur estas riĉaĵo

dotita de la naturo al la homaro, kaj malmulte sciis, de la flanko de bionologia ekvilibro, la valoron de tiu ĉi riĉaĵo. Pro tio oni tiel senplane kaj senbride hakis kaj detruis la riĉaĵon, ke grandkvante malaperis arbaroj el la terglobo kaj aperis sekve multaj dezertoj, kie povas kreski nenia vegetalo.

La usona revuo "Semajna Novajo" (Newsweek) raportis, ke de 1950 ĝis 1980 la arbaroj de la mondo malmultiĝis duonon —

ĉiujare perdiĝis 1-2%. Laŭ takso de mediprotekta fakulo, ĉiujare detruigās arbarzono granda kiel Kubo. En la 30 jaroj oni forhakis du trionojn de la primitivaj arbaroj de Latin-Ameriko. En Brazilo jam tute malaperis la brazila arbo. En Afriko duono de la arbarzono jam fariĝis dezerto. En la lastaj 10 jaroj en Tajlando oni jam forhakis kvaronon de la arbaroj.

SENBRIDA HAKO

Multaj kialoj kaŭzis la seriozan detruadon de la monda arbaro: unue, preni arbaron kiel hejtajon. Tia stato estas serioza en la regionoj, kie tre mankas hejtajoj. En la afrika Voltalando, por liveri brulaĵojn al la ĉefurbo Ouagadougou, oni jam forhakis grandan parton de la tiea arbarzono. De Tanzanio ĝis Eburbordo, por ricevi brulaĵojn, oni jam tute forkonsumis la grandareaĵajn ĝangalojn. En Afriko 90% de la hakitaj arbaroj estis uzitaj kiel hejtajo.

patroj, sed ĉe siaj gepatroj por teksti vestojn por la edzo, por la venonta infano kaj por si mem. Ŝi vizitas siajn bogepatrojn nur en festotagoj kaj aferoplena sezono. Kiam ŝi estas graveda, ŝi, akompanate de membroj de la hejmo de siaj gepatroj portantaj ŝiajn teksilon, ŝpinilon kaj aliajn necesajojn por la vivo, iras al la hejmo de siaj bogepatroj por tie fikslugi.

MORALAJ AGOJ

En la vilaĝoj de dungoj troviĝas neniuj kota vojoj. Tie la surfaco de la vojoj estas kovrita per ŝtonplatoj. La dungoj heredis la diligentecon, modestecon kaj

helpemon de siaj prapatroj. Se bebo estas naskita en iu familio, ĉi tiu dehakas abion en monto por larĝigi ponteton aŭ anstataŭigi iun ĝian kadukan parton. En sia naskotago la dungaj maljunuloj riparas vilaĝan straton kunportante sekan manĝaĵon anstataŭ akcepti hejme la bondezirojn de siaj parencoj kaj amikoj. En sia libertempo la virinoj plektas pajlajn sandalojn kaj ilin pendigas en kioskoj de vento kaj pluvo por la dispono de vojirantoj. Ĉe ĉiuj vojkruciĝoj videblas ŝtona vojmontrilo, kiun oni starigis el sia propra iniciatemo. Se vi soifas survoje, turnu vian kapon flanken kaj tiam vi

povas trinki agrablan fontakvon kondukitan el monto per sinsekvo da bambuoj metitaj de dungoj. Vintre oni metas fajrujojn en la kioskojn de vento kaj pluvo kaj sur la ornamaj pontoj por varmigi la vojirantojn kaj some-re portas al ili teon por kvietigi al ili la soifon. La moralaj agoj de dungoj estigis ĉe mi estimon al ili.

ĈIUJ VILAĜOJ PLENAJ DE KANTOJ

La tieaj loĝantoj fiere nomas sian vilaĝon "vilaĝo de kanto". Kantojn la maljunuloj instruas, la junuloj kantas kaj la infanoj

Due, agrigi arbarojn kaj senplane ekspluati. Pro malhavo aŭ manko de agro kamparanoj de multaj landoj estas devigataj ŝanĝi arbarzonojn en agroj. Laŭ statistiko de UN, en Azio ĉiujare okdek milionoj da homoj forhakas 19 milionojn da hektaroj da arbaro. Krome, la bienuloj, kiuj havas vastan teron, por havi paŝtejojn kaj fari lignan komercon, senbride forhakas la arbarojn. Ekz. la bienuloj en la regiono de Amazono en Sud-Ameriko ĉiujare detruas arbarojn valorajn je miliardo da usonaj dolaroj. Laŭdire, la fumo ellasita de la arbarbruligado kovris la vidon de pilotoj kelk-mil metrojn alte en la aero. Antaŭ dek jaroj, por konstrui tra-amazonan ŝoseon Brazilo detruis pli ol tri milionojn da hektaroj da arbaro.

Trie, la internacia monopola kapitalo freneze prirabas la arbarojn. En la pasintaj 10 jaroj en la Amazona regiono de Sud-Ameriko 8 milionoj da hektaroj da arbaro jam estis transformitaj en paŝtejojn aŭ aliajn.

La plejparto de tio estis farita de la transnaciaj korporacioj. Materialo diras, ke laŭ tiu rapideco tiuj proprietuloj "estas kreantaj duan Saharon". La klikoj de la monopola kapitalo ankaŭ prirabas grandkvante la valorajn lignojn de la sudorienta Azio. Laŭ statistiko, ĉirkaŭ du trionoj de la produktaj el malmolaj lignoj de la mondo estas el la sudorienta Azio, ĉefe el Filipinoj. Fakuloj taksis, ke en 1990 komplete perdiĝos la arbaroj en la malaltaĵoj de Malajzio kaj Filipinoj. La rabista ekspluatado terure damaĝis la ekonomion de la disvolviĝantaj landoj. Ekz. Tajlando estis iam la ĉefa eksportanto de tektona ligno, sed en 1980 ĝi aĉetis de aliaj landoj lignaĵojn kontraŭ cent milionoj da usonaj dolaroj.

PLAGA SEKVO

La detruado de la arbara riĉfonto de la mondo jam kaŭzis seriozan danĝeron. Se oni ne ĉesigos la barbaran hakadon per efikaj rimedoj, pli kaj pli graviĝos la damaĝo.

Unue, pro la grandskala forhako de la arbaro, la bionologia sistemo estas tiel detruita, ke en multaj regionoj ofte okazas inundo, erozio kaj ŝtopiĝo de irigaciaj sistemoj. La utilo de senplana ekspluato de la arbaroj neniel povas kompensi eĉ parton de la giganta damaĝo alportita de katastrofoj. Ekz. en Hindio ĉiujare forfluas 6 miliardoj da tunoj da tero, meznombro 10 tunoj por ĉiu persono. En Nepalo, pro erozio en rivervaloj, la montdeklivoj de Himalajo multiĝas jaron post jaro. En 1981 la provinco Sichuan en sudokcidenta Ĉinio estis plagita de diluvo. Krom la intensa pluvegado, ankaŭ la barbara hakado de la arbaro dum la pasintaj jaroj estas grava akcelilo de la katastrofo. Ne nur en Sichuan, sed ankaŭ en aliaj lokoj de Ĉinio la arbaro detruigis jam ĝis maltrankviliga grado. Tial Ĉinio nun streĉe arbarizas la landon. Eĉ se tiel agas Ĉinio, la plagan sekvon de arbarodetruado ĝi tamen ne povos forigi en mallonga tempo.

lernas. Kantoj iras de generacio al generacio, kio fariĝis moro. Yao Rongyi diris al mi, ke en la komenca periodo post la Liberiĝo li funkciis kiel vicestro de la gubernio Tongdao. Antaŭ ol fari propagandon inter la vilaĝanoj, li adaptis al kantoj la politikojn kaj dekretojn de la popola registaro. Atinginte iun ajn vilaĝon, li ekkantis per plena voĉo antaŭ turoj de sonorilo kaj tamburo kaj tiamaniere li elvokis vilaĝanojn, kiuj ĉirkaŭis lin por aŭskulti lian kanton. Poste la kanto estis transkantata de unu dungo al alia. Tio estis multe pli efika ol longa politika raporto.

La dungaj kantoj havas pli ol 30 specojn, kiel popolkantoj, junulaj kantoj, maljunulaj kantoj kaj admonaj kantoj. Iuj el ili havas difinitajn vortojn kaj aliaj povas esti improvize kantataj. La dungaj kantoj originas el la kanta sistemo de la triba konsilantaro praktikita de la antikvaj dungoj. La regularo ellaborita de ili gvidis ĉiujn iliajn agojn. Sen skriba lingvo la dungoj ellaboris la regularon en formo de poemo karakterizita per harmonio de sonoj kaj sencoj po du linioj kaj adaptis ĝin al kantoj. Kaj la regularo temas pri la leĝo, kulto, historio, juĝo, festonado kaj astronomiaj, geogra-

fiaj kaj terkulturaj scioj. Jen kial tiaj kantoj nun restas ŝatataj de la dungoj. Yao Rongyi diris al mi, ke por festi ies naskotagon oni prezentas kanton anstataŭ doni parolon kaj la ĝejnuloj esprimas sian amon ĉiam per kantoj. Li aparte ĝuigis al mi la surbendigitajn kantojn, kiujn liaj samvilaĝanoj kantis ĉe la finkonstruo de lia nova loĝejo. La kantoj daŭris sen interrompo kaj miksiĝis kun rido kaj parolo. Dume Yao zumis laŭ sonbendo signante la takton per la kapo, kun iom fermitaj okuloj, kaj li dronis en gaja rememoro.

Due, la detruigo de la arbaroj sabligas la kampojn. En la tropikaj arbaroj troviĝas fekunda tertavolo, se ĝi estas ekspluatata kiel kampo, la varmega sunradio fendas la teron kaj faras ĝin malmola krusto, kaj sen sufiĉa sterko, neniam vegetaloj povas tie kreski. En la komenco de ĉi tiu jarcento, en Amazona regiono, proksime al la nordorienta marbordo, troviĝis iam arbarzono granda kiel Belgio. Post ekspluatado ĝi siatempe estis rigardata kiel la modelo de ekspluatado en Amazona regiono. Sed en la kvardekaj jaroj ĝia fekundeco estis plene forkonsumita kaj ĝi fariĝis sovaĝejo, kaj la kamparanoj devigite transloĝis aliloken. Post kiam fekunda kampo fariĝis dezerto, estas tre malfacile limigi ĝian disvastiĝon. Nun Saharo ĉiujare etendiĝas suden 30-50 kilometrojn.

Trie, la detruado de la arbaroj malbonigas la klimaton. Laŭ mezuro de iu esplora grupo, la kvanto de karbona dioksido en la aero, kreskanta pro la bruligado de la arbaro, faras la tergloban atmosferon pli kaj pli varma. Pro la malapero de la flaŭro, oni antaŭkalkulas, en la venontaj 70 jaroj la temperaturo de la atmosfero de la terglobo meznombro altiĝos per 2°C. Samtempe, malharmoniĝos la distribuo de pluvo kaj estiĝos longtempa sekegeco por iuj regionoj.

Kvare, grandnombre malmultiĝas la specoj de la animaloj kaj vegetaloj kaj la fonto de vegetaloj por medikamentoj estas minacata. Fakuloj atentigas, ke kvankam la tropikaj arbaroj kovras nur apenaŭ dekonon de la surfaco de la terglobo, ili tamen estas la loĝejo de ĉirkaŭ duono de la specoj de la vegeta-

loj kaj la animaloj de la mondo. Se daŭros la senbrida hakado de la arbaroj, pereos 20% de la specoj de animaloj kaj vegetaloj. Ĝenerale, kvarono de la medikamentoj, kiujn la homaro uzas, estas fabrikita el vivajoj kaj multaj specoj de la medikamentaj vegetaloj kreskas nur en tropikaj arbaroj. Se la tropika arbaro estos tute detruita, la sano de la homaro estos terure minacata. Krome, la tropikaj arbaroj liveras al la homaro kelcent specojn de porindustria oleo, rezino kaj tinkturoj, kiuj estas tute nemalhaveblaj al la homa vivo.

Nun oni jam pli kaj pli klare konscias la gravecon de la arbaroj por la vivo de la homaro. Pli kaj pli multaj landoj ekzorgas la ekzistantajn arbarojn kaj klopodas arbarizi la teron por grandigi la vegetalan kovraĵon de la terglobo.



Pego: "Infanoj, li estas la plej ĉefa el la insektoj malutilaj al arboj."



AGADO POR ESPERANTO

Kun vera plezuro kaj granda intereso ni legis en EPC n-ro 5 la artikolon "ESPERANTO KAJ LA TRIA MONDO" de aŭtoro Zhang Qicheng. Ni plene konsentas kun li, ke en ĉiuj okcidentaj landoj, la esperantistoj nepre devas kontakti kun triamondaj studentoj lernantaj en tiuj landoj, ne nur por informi ilin pri Esperanto, sed ankaŭ por sin ekkonscii pri la problemoj de la tria mondo, kies intereso pri E-o estas grava kondiĉo al tutmonda disvastiĝo de la internacia lingvo.

Aliparte, ĉiuj nunaj esperantistoj devas kompreni, ke ili estas, vole ne vole, pioniroj; ke lerni E-on ne estas sufiĉe se ili ne agas por informi kaj propagandi en ĉiuj medioj per taŭgaj metodoj kaj propagandiloj.

Pro tio kreiĝis Grupo de Agado por Esperanto en Francio, kies faka okupado konsistas el informado al la homamaso pri E-o. Tiurilate, plej efika metodo ĝis nun ŝajnas esti prelegetoj en unuagrada lernejoj, kie ni facile kunvenigas tutajn klasojn da lernantoj 9-12-jaraj kun iliaj instruistoj. La entuziasmo de tiuj infanoj estas ĉiam sensacia kaj venkas la eventualan dubemecon de kadruloj. Plie, tiuj informitaj gejunuloj kunportas en familion trafran resuman folion pri farita prelego, kiu impresas plenkreskulojn.

Ni gratulas vin kaj esperas, ke vi daŭrigos publikadon de tiaj bonegaj artikoloj pri informado kaj propagando nacia kaj internacia.

BOBERT J. M. MORAUD
(Francio)

PRI PRELEGO DE HONFAN

Ĉi-sube estas du leteroj de niaj legantoj rilate al la supra temo. La unua el ili estis skribita rekte al la aŭtoro.

LA RED. DE EPC

Mi grandplezure legis vian artikolon pri la Internaciecoj de Esperanto, en la n-ro 283 de El Popola Ĉinio; mi jam legis ĝin dufoje kaj verŝajne denove relegos!

Sed permesu, ke mi prezentu min: mi estas 65-jara, eksinstruisto pri lingvoj, en 1959, mi fondis Esperantan eldonejon kaj reeldonis la verkojn de Zamenhof FUNDAMENTO DE ESPERANTO, LINGVAJ RESPONDOJ, HAMLETO KAJ MARTA. Nun, krome, mi estas unu el la perantoj de EPC en Francio.

Jes, vi plej prave aludas pri la nepra rolo de la Fundamento de Esperanto, sed bedaŭrinde, multaj Libro-servoj de Naciaj Asocioj eĉ ne enlistigas la Zamenhofaĵojn en sia katalogo! Ĉu ne vera skandalo? Sekve, estonte multaj esperantistoj ne konos tiun bazan verkon; kiel ili povos ĝin respekti?

La abonojn de EPC mi ne pagas per mono sed per libroj, kiujn mi eldonis kaj espereble baldaŭ mi ricevos bonan mendon de Guoji Shudian; tiam oni povos disvendi tiujn verkojn en via lando.

Aliparte, mi samopinias kiel vi: ioma anarkio estas trovebla en la E. vorttrezoro; ekz., ĉu normale bezoni tri radikojn por POEMO, POETO kaj POEZIO. Sed, pro tio, ke oni flankenmetas la Zamenhofaĵojn, oni ne plu konas la delikataĵojn de nia lingvo, kiu iom post iom disdialektiĝos.

Estas bonege, ke homoj kiel vi konscias pri la danĝero kaj jam nun anoncu la kuracilojn! Ni devas ne nur fabriki oportunajn vortojn novajn, sed precipe fabriki ilin laŭ

la spirito de la lingvo kaj laŭ la Zamenhof-maniero.

A. RIBOT
(Francio)

INTERNACIAJ VORTOJ KONFORMU AL LA UNIKA SISTEMO DE ESPERANTA VORTFARADO

Mi tutkore konsentas kun la opinioj de Honfan esprimitaj en lia prelego en la Dua Kongreso de la Pekina Esperanto-Asocio, aperigita en la aprila numero de El Popola Ĉinio. Estas tro da eŭropa influo pri la enkonduko de vortoj, kiuj vere ne estas internaciaj, sed nur eŭropaj. Kiel aŭstraliano mi apartenas al azia lando, kiu uzas eŭropan lingvon.

Grava estas la 15-a regulo pri internacieco, sed eĉ pli grava estas, ke tiuj internaciaj vortoj konformu al la unika sistemo de Esperanta vortfarado.

Estis eraro, laŭ mia opinio, enkonduki en la 3a Oficiala Aldono la vorton "administracio", kiam ni jam havis la vorton "administri" en la Universala Vortaro. Mi konstatas, ke ĉiuj vortaroj devas listi "administracio", sed ni devus noti apud ĝi "evitinda", vidu "administri", kie oni trovas la formojn "administrado", "administrejo" kaj "administrantaro". "Redakcio" troviĝis en la korektaro de la U.V., sed kiam ni enkondukis en la Unua Oficiala Aldono la vorton "redakti", el kiu ni povas derivi la vortojn: "redaktejo", "redaktanto" kaj "redaktisto", la vortoj "redakcio" kaj "redaktoro" vere fariĝis evitencaj.

En la Dua Aldono ni enkondukis la vorton "inkluziva", en kiu la finaĵo "iv" faras ĝin adjektivo. Vere ni devus enkonduki la verbon "inkluzi" aŭ eĉ pli bone "inkludi", el kiuj ni rajtas derivi la aliajn necesajn vortojn, tiel evitante adjektivan finaĵon en verko. Same es-

(Daŭrigota sur p. 33)

Ŝtonoj kaj porkoj de la insularo Wallis


Okcidente de la Okcidenta Samoo en Pacifiko sin trovas la insularo Wallis, sur kiu loĝas ĉirkaŭ 10 000 polinezianoj. Kiel antaŭa kolonio de Francio ĝi fariĝis franca transmara teritorio en 1961. Sed ĝia leĝo restas kutimo ne skribita sur papero, tamen, ekzistanta dum miloj da jaroj en la vivo de la insulanoj. Por praktikado de la leĝo ŝtonoj kaj porkoj ludas la ĉefan rolon.

De la antikveco polinezianoj devas esti punitaj kaj doni ŝtonojn, se ili malobservas la leĝon. Ekzemple, oni punas ŝteliston per kvindek ĉaroj da ŝtonoj kaj ebriulon per dek. La punitoj donas tiom da ŝtonoj al sia vilaĝo, tiel ke ĉiuj vilaĝanoj ekposedas ilin.

La polinezianoj sin nutras ĉefe per fiŝaĵo, kasavo, taroj, batatoj

kaj fruktoj de panarbo. Ĉiuj familioj bredas porkojn kaj ĉiu geedza paro bredas ĝenerale dudek porkojn. De miloj da jaroj la insulanoj rigardas la porkon kiel simbolon de belo, feliĉo kaj favoro, tial ili lasas porkojn iradi ien ajn. Kiam infano ricevas diplomon pri sia lernado, oni buĉas porkon por lia brila estonteco.

La du konfliktantoj ĵuras antaŭ porka kapo.



Rigardate de malproksime, ili aspektas kiel antikvaj kasteloj.

Antaŭ ies vojaĝo oni tion faras por montri sian profundan amikecon. La edzo donacas buĉitan porkidon al sia akuŝonta edzino, por ke ŝi alportu feliĉan vivon al la familio. Tuj kiam la bebo estas naskita, la patro buĉas duan por gratulo. Kiam la infano estas unumonata, li mortigas trian por regali siajn gastojn.

Estas tre interese, ke kiam konfliktas loĝantoj, oni unue ordonas ĉashundon kapti porkon kaj, ĝin mortiginte, postulas, ke la konfliktantoj faru ĵuron antaŭ la kapo de la porko. Poste ili iras respektive al sia hejmo kaj elkondukas po unu porkon antaŭ la tribestron por atendi la juĝdecidon. La tribestro deklaras, ke venkas tiu, kies porko estas pli peza. Tiu juĝmaniero daŭris tra jarcentoj kaj ĝin oni sekvas ankoraŭ nun.

Putoj fariĝis "kasteloj"

Restas nun ankoraŭ nemalmultaj ŝtonaj cilindroj sur strando ĉe la Persa Golfo nordoriente de Saudi-Arabio. Ili, kun alteco de dekelkaj metroj kaj diametro de kelkaj metroj, staras en vico kaj distancas

dekojn da metroj unu de alia. Rigardate de malproksime, ili aspektas kiel antikvaj kasteloj. Ili fakte estas muroj ĉirkaŭ putoj konstruitaj de araboj antaŭ kelkaj jarcentoj. Tiam la klimato estis varmeta kaj pluvo abunda. La loko estis oazo plena de palmoj. La loĝantoj, sin okupantaj pri terkulturo kaj brutobredado, fosis grandegajn putojn laŭ subtera rivero orienten fluanta sub la strando. Poste, la loĝantoj ĉiujare altigis la randojn de la putoj per ŝtonoj por malebligi la eniron de sablo alportita de vento el okcidenta dezerto. Pli poste, la sablo flugis al alia loko kaj la altaj muroj elstariĝis sur la strando. Nun la putoj kun tiaj muroj fariĝis fama turisma loko de Saudi-Arabio.

Mistera insulo

Oni nomas la pitoreskan kaj tutjare varmetan Malton "mistera insulo" en Mediteraneo pro tio, ke tie sur montsuproj staras multaj antikvaj kasteloj kaj domoj kun muroj el ŝtonaj blokoj. En iuj ŝtonaj domoj troviĝas ŝtonaj objektoj, kiuj similas al tablo, benko kaj lito. Preskaŭ ĉiu turisto, kiu vojaĝis tien, elmetis la demandon: Kiuj kaj per kiaj iloj transportis tiom da ŝtonoj dekojn da metroj longaj kaj dekojn da tunoj pezaj al la montsuproj por konstrui domojn? Povus esti, kiel iuj asertas, ke tio estas la esenco de laboro de la antaŭhistoria popolo, tamen tio restas ankoraŭ enigmo por la turistoj de nia tempo.

La misteron de Malto priskribis jam helena mito: En Mediteraneo pereis milita floto. Restis iu bravulo, kiu laŭ vento flosis al Malto kaj enamiĝis al diino sur la insulo. Post tio aperis unu post alia interesaj legendoj, poemoj kaj pentraĵoj pri la insulo. Tiuj mitoj altiris nemalmultajn reĝidojn kaj aventuristojn al la loko por serĉi fejon aŭ trezoron. Tien venis ankaŭ diverslandaj turistoj dum la pasintaj dekelkaj jaroj.

Fortondo de sago

El Humuraĵoj de la Antikva Ĉinio



1 Iu generalo estis trafita de sago je la brako.




2 Li venigis ĥirurgon por kuraci la vundon.



3 La ĥirurgo fortondis la sagovergeton kaj postulas la pagon.



4 La generalo koleriĝis: "La sagopinto ankoraŭ restas en la karno!" La ĥirurgo diris: "Tio apartenas al internaj malsanoj."



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 internacia respondokupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 respo. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Esperantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPC povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

La Red.

- * F-ino Lidia Sanchez-Mellado P. -Bustos (21-jara), str. La Estrella 14, Criptana-Ciudad Real-, Hispanio. dez. kor. kun junaj viroj tutmonde sed speciale el Ĉinio, Hindio, Hungario, pri prakulturoj, filozofio kaj aliaj diversaj temoj.
- * F-ino Carmen Diaz-Hellin Martinez del Rey (19-jara studentino pri pedagogio), str. Santa Ana 32, Criptana-Ciudad Real-, Hispanio, dez. kor. kun geamikoj tutmonde sed speciale el Ĉinio, Hungario, Svislando, Nederlando, Svedujo, Aŭstrio kaj Usono pri ĉio.
- * Manĉlandaj 16-26-jaraj gelernantoj de la Elementaj Esperanto-kursoj deziras amikiĝi kaj korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Respondu al: Director de "Hito", Veracruz 2., Criptana-Ciudad Real-, Hispanio.
- * 14j. knabino longe serĉas amik(in)on el Ĉinio, Lenka Masarikova, Kocianov 77, 78811 Loučna n. Des, Okres Sumperk, Ĉeĥoslovakio.
S-ano Kanev Saša, ul. kr. Partaĉev 8, 4579 gr. Bracigovo, Bulgario, deziras korespondi kun ĉina esp-istino.
- * Harry Torr, 30 Millhouse Crescent, Higgins, A.C.T., 2615, Aŭstralio, ŝatus korespondi kun ĉino pli ol 55-jar-aĝa.
- * 14j. knabino longe serĉas amik(in)on el Ĉinio, Jitka Dajcarova, Kocianov 68, 788 11 Loučna N/D, O. Sumperk, Ĉeĥoslovakio.
- * Ili deziras korespondi el Jugoslavio:
Junulara Esperanto Klubo "Jugoslavio", 72000 Zenico, Vilaĝo Arnauti.
Lerneja Esperanto Klubo "Libereco", Os "Omer Maslic", Babino 72000 Zenica, dez. kor. kun esperantistoj el Ĉinio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Francio kaj Anglio.
Lerneja Esperanto Klubo "Amiko", Os Arnauti, 72000 Zenica,
- dez. kor. kun esperantistoj el Ĉinio, Pollando, Svedio, Sovetunio, Finnlando, Bulgario, Italio, Nederlando, Hungario, Irano kaj Hispanio.
- 18j. Ormanovic U. Mesud, 72207 Puhovac, Arnauti.
Arnaut Senija, lernantino, 72207 Puhovac-Arnauti.
- 14j. Mujĉinovic Mirsad, Jasika 72207 Puhovac.
- 17j. Mulic Muhamed, Otoka 72207 Puhovac-Zenica.
- 18j. Arnaut Ismet, Luka 72207 Puhovac.
- * Gerard Gerritse, 24-jara, Prinses Marijkestraat 6, NL-6566 AW Millingen aan de Rijn, Nederlando, dez. kor. kun ĉinaj geesperantistoj pri ĉiaj temoj. Miaj hobiaj estas bicikli, ĝardenumi, legi, moderna muziko.
- * Pentristo deziras interŝanĝi oleopentraĵojn (pejzaĝoj), Fredo Bosmans, 21 rue de Comblain 4183 Ferrieres, Belgio.
- * F-ino Maria Jose Briega Roman (19-jara studento pri pedagogio), str. Juan XXIII-5, Criptana-Ciudad Real-, Hispanujo, dez. kor. kun geamikoj tutmonde sed speciale el Ĉinio, Belgio, Japanio, pri ĉiuj temoj.



La baleto estas kreita laŭ jena legendo de la manĉura nacieco: Juna fiŝisto Shudong'e kaptis en la lago mitulon kun brila perlo ene. Informiĝinte pri tio demono venis por ĝin forrabi. Pro tio Shudong'e ree enlasis ĝin. La mitulo estas efektive princino Tana de la Perla Lando, kaj ŝi ekamis la diligentan kaj honestan Shudong'e pro lia savo. Ĉe ilia nupto, la demono sin alivestigis kiel gasto kaj forrabis la perlon de sur la kapo de la princino, pro kio tuj blindiĝis la novedzino. Shudong'e persekutis la demonon kaj ĝin mortigis. Sed pereis ankaŭ la princino. La novedzo iris en la lagon kun sia edzino en la brakoj. Subite el la lago leviĝis paro da rokoj kaj la lago pleniĝis de fiŝoj, salikokoj kaj perloj. Ekde tiam oni nomis ĝin Perla Lago.



La princino Tana



Duopa danco de Shudong'e kaj Tana

Baleto

“Perla Lago”

Fotoj de LAO BAI



Gaja geedziĝa ceremonio



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO(6)



Kampoj apud la rivero

Nova Fizionomio Ambaŭborde de la Flava Rivero

Fotoj de ZHOU QINJUN




La kanalo Venko, kiu povas irigacii 40 000 hektarojn da agroj




En rikolta sezono





Fortikaj digoj sekurigas la apudriverajn vilaĝojn kaj kampojn.



8152

戊午夏
閩事故里
高鄉之士
身兄
鳳梨碩果適
野喜不自勝
應申除夕
翻然舊拓
即興一揮
沈秉經

